

ISSN 1846-5021

GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

# Zagreba Esperantisto

গণসংস্কৃত  
তৃতীয় সংস্করণ

**Ĉi-numere legu pri:**  
**DŬ JARDEKOJ DE SENDEPENDA KROATIO**  
**VERKISTA RENKONTIĜO PRI VASILIJ JEROŜENKO**  
**LA RINGLUDO DE SINJ**  
**MIRINDA ESPERANTISTA RENKONTIĜO**  
**(MIRO) EN STARA SUŜICA**  
**SUBJEKTIVECA RAPORTO PRI LA**  
**UNIVERSALA KONGRESO EN KOPENHAGO**  
**SUBVENCIO CIGNO ATRIBUITA AL DEC**

La fortikaĵo de Knin

3

2011

## Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj  
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

## Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević  
Goljak 43  
HR-10000 Zagreb  
rmilos23@gmail.com

## Plenumredaktoro:

Josip Pleadin  
B. Jelačića 138 A  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
josip.pleadin@gmail.com

## Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
grafokom@kc.htnet.hr  
zagreba.esperantisto@gmail.com

## Redakciaĵoj:

Krešimir Barković, Snježana  
Habulin, Marija Jerković,  
Vida Jerman, Jozo Marević,  
Radenko Milošević,  
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

## Konstantaj kunlaborantoj:

Nicole Else (Aŭstralio), Małgosia  
Komarnicka (Pollando), Imre  
Szabó (Hungario)

## Presis:

Grafokom, Đurđevac

## Aperritmo:

6 numeroj en 2011

## Konto de UZE:

2340009-1110321529  
(Privredna banka, Zagreb)

## UEA-kodo:

uzes-y

## RESUMO

Ho, kia faciligo! Per tiu ĉi kajero de "Zagreba Esperantisto" ni kvitigas niajn ŝuldojn al homoj kiuj abonis ĝin ankoraŭ en 2009. Ni staras ĉe sojlo de nova periodo, kaj invitas vin subteni niajn klopodojn per viaj abonoj kaj subteno, pri kio bv. legi sur la paĝo 95.

Ĉi tiu numero aperas en la momento kiam Kroatio festas du jardekojn de sia sendependeco. Ni rememoras tiun jubileon per enkonduka artikolo kaj per omaĝartikolo pri kroataj esperantistoj kiuj perdis sian vivon dum la Patrolanda milito.

Kiel ĉeftemon pri Kroatio, ni elektis la historion de la ringludo de urbo Sinj, la ludo kiu revenigas nin en la kavaliran tempon. Pri tiu malnova ludo esperantistoj eksciis ankoraŭ en la jaro 1926 per traduko de "Ano de l' ringludo" de kroata verkisto Dinko Šimunović, el kiu ni ĉerpas mallongan ĉapitron.

Raportoj jam tradicie informos vin pri internaciaj kaj enlandaj Esperanto-eventoj. El la internaciaj ni elektis tiujn plej grandajn (la Universalan Kongreson kaj Internacian Junularan Kongreson), sed ankaŭ kelkajn fakajn (ILEI-konferencon, INA-konferencon kaj kunvenojn de IKEF kaj TEĴA dum la UK) kaj unu landan kongreson, ĉi-foje la aŭstralian.

Viaj reagoj instigas nin denove reveni al la jam pritraktitaj temoj. Kelkaj niaj legantoj atentigis nin, ke nia prezento de la IKUE-kongreso ne reseĝulis la veran gravecon de tiu evento. Pro tio ni publikigas pli longan artikolon de unu el la partoprenintoj, kiu prezentas plian buntecon de tiu ĉi malgranda sed modele organizita aranĝo. Ni revenas ankaŭ al la temo pri Internacia jaro de arbaroj, prezentante al vi la inviton al konkurso de la gazeto "Juna amiko".

Meze de septembro okazos en Kroatio la jam tradicia Verkista renkontiĝo, kies ĉefa temo estos Vasilij Jeroŝenko. El la plumo de prelegonto ni prezentas al vi la ĉi-teman artikolon kun aldono de la plej konata poemo de Jeroŝenko, "La antaŭdiro de la ciganino", en la Esperanta kaj kroata versioj.

Ni mencias ankaŭ kelkajn enlandajn sukcesojn: la okazigon de Mirinda internacia renkontiĝo (MIRO), la 3-an Esperanto-boatadon laŭ la rivero Kupa kaj la informon pri Subvencio Cigno kiun UEA atribuis al Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac.

Kaj gazetofine pli facilaj temoj: rakonto tradukita el la hungaraj eseeto pri proverboj rilatantaj la temon de mensogo kaj noticoj pri "La kapreolido Pirgo".

Dezirante al vi bonan legadon, ni invitas vin sendadi viajn artikolojn, ĉar nur tiel "Zagreba Esperantisto" fariĝos ankoraŭ pli interesa.



# DU JARDEKOJ DE SENDEPENDA KROATIO

*✍ Radenko Milošević*

Kiam oni fiksas titolon de iu artikolo, tuj svarmas aro da diversaj demandoj. Kiel prezenti la temon? Kia efektive estas la temo pri kiu oni skribu? Jubileo de ŝtata sendependeco! Dudekjara jubileo, sed ĉu vere nur dudekjara? Kia estis la tempo heredita kaj kiaj la spertoj dum la sendependiĝo? Se oni gratulas al iu la jubileon, ĉu menciendaj iuj mistraĵoj el la pasinto? La spaco por tia teksto estas tro malgranda, ĉar ĝi postulus apartan libron!

Verdire, ne temas nur pri “du jardekoj de sendependa Kroatio”, sed pri reakiro de kroata sendependeco okazinta per fondo de la suverena Respubliko Kroatio. En ĝiajn fundamentojn estas enkonstruita la unua konfirmo de ŝtata sendependeco far la papo Johano la 8-a, donita al la kroata duko Branimir la 7-an de junio 879. Praformo de moderna kroata ŝtato estas ankaŭ la mezepoka reĝlando Kroatio el la 9-a jarcento kaj multaj pli postaj historie pli-malpli sendependaj kroataj ŝtatoj en specialaj rilatoj post la jaro 1102 kiam kroatoj subskribis la deklaron nomata “Pacta conventa” per kiu, kune kun la hungaroj, ili eniris reĝlandon regatan de komuna reĝo, kion sekvis la pli postaj rilatoj kun Hungario kaj kun Aŭstrio.

Vojo al la sendependeco de Respubliko Kroatio iris tra la decido de la kroata parlamento *Sabor* la 29-an de oktobro 1918, per kio estis disigitaj la rilatoj kun Aŭstri-hungara imperio, kaj komenciĝis la bedaŭrinda multjara kroata ŝanceliro en du altruditaj sudslavaj ŝtatoj. Sekvis la kunvivado de kroatoj kun aliaj slavaj popoloj kaj respublikoj en la komunisma Jugoslavio. Multaj ekonomiaj, sociaj, naciaj kaj interrespublikaj streĉoj en la lasta sudslava federacio, jaron post jaro gvidis al la disfalo de

la artefarita kunmetaĵo de sudslavaj popoloj. Verdire, tian ŝtatokunecon kreis kroataj iliraj politikistoj, kontraŭaj al la intencoj de t.n. “patro de hejmlando” Ante Stračević kaj la avertoj de la popola politikisto Stjepan Radić.

La fina paŝo al la sendependeco de Kroatio troviĝas ankaŭ en la eventoj de kelkaj sinsekvaj jaroj de 1990-aj. La komunismaj ŝtatoj kun la regantaj komunismaj partioj malvenkis. La komunisma partio en Kroatio, post la konkludo de sia kongreso en la jaro 1989, komence de 1990 ebligis, per ŝanĝoj de la leĝaro, liberan politikan kandidatiĝon al ĉiuj, kaj fondon de novaj politikaj organizoj kaj partioj. En la unuaj liberaj balotoj en aprilo kaj majo 1990, en Kroatio estis elektitaj deputitoj de la tiama triĉambra parlamento. La balotoj estis taksitaj de eksterlandaj observantoj “altgrade liberaj kaj honestaj” kaj la 30-an de majo estis formita la multpartia Sabor, kun la plimulto de deputitoj de Kroata demokratia unuiĝo (kroate: *Hrvatska demokratska zajednica*) kaj la prezidento d-ro Franjom Tudman. Samtempe la jugoslava armeo forprenis armilojn el ĉiuj kroataj militdeponejoj, kio kaŭzis proteston de la respublikaj aŭtoritatoj ĉe la federacia registaro. Tuj estis klaraj komprenitaj la intencoj de la pinto de serbaj ekstremistoj, kiuj kaŝitaj malantaŭ la jugoslavia nomo preparadis kontraŭstaron al demokratia Kroatio.

En decembro 1990 estis akceptita la nova kroata Konstitucio (nomata la “Kristnaska”), en kies komenco estis skribite, ke “la kroata popolo en la unuaj liberaj balotoj ... , per libere deklarita deziro, atestis sian miljaran ŝtatan memstarecon”. Kroataj serboj kontraŭstaris tian decidon proklaminte la t.n. “serban aŭtonaman regionon” Krajina

(=limregiono), kaj helpitaj de la jugoslavia armeo, ili komencis atakadi la leĝajn organojn kaj vilaĝojn kun la kroata loĝantaro plimulto.

La referendumo en 1991 rezultis, ke el 85 procentoj da civitanoj kiuj voĉdonis, 94 procentoj voĉdonis por la sendependeco. *Sabor* akceptis la decidon pri sendependiĝo kaj prokrastis ĝian plenumon je tri monatoj. En aŭgusto 1991 en kadro de "Packonferenco", la t.n. Arbitracia komisiono prezidita de franca juristo Badinter, akceptis jurajn starpunktojn, laŭ kiuj "Socialisma federacia respubliko Jugoslavio disiĝis kaj ne ekzistas plu kiel ŝtato kaj neniuj ŝtato postsekvinta ĝin havas rektan rajton kiel membro en internacia organizo".

Tia konkludo de la Arbitracia komisiono, kaj konstantaj atakoj de serbaj taĉmentoj el Serbio kaj Kroatio, helpitaj far la t.n. jugoslavia armeo kontraŭ la kroataj urboj, vilaĝoj kaj homoj, kies fina atako estis bombardo de "Banusa Kortego" (kroate: *Banski dvori*), kie kunsidis la plej elstaraj politikaj personoj de Kroatio, rezultis per unuvoĉa decido de *Sabor*: "Respubliko Kroatio ekde la 8-a de oktobro 1991 disigas la ŝtat-jurajn ligojn surbaze de kiuj ĝi kune kun la aliaj respublikoj kaj teritorioj konsistigis la ĝisnunan SFRJ. Respubliko Kroatio neas legitimecon kaj legalecon al ĉiuj organoj de la ĝisnuna federacio – SFRJ. Respubliko Kroatio aprobas validecon de neniuj juraj aktoj de iu ajn organo kiu reprezentas la eksan federacion – SFRJ."

Kiel tuŝi la bedaŭrindan altruditan militon en la procedo de sendependiĝo? Kiel tuŝi la nunan tre komplikan soci-ekonomian situacion, komparante ĝin kun la pli frua?

Per la armila ribelo de parto de la serba loĝantaro de Kroatio komenciĝis la Hejmlanda milito (kroate: *Domovinski rat*). En la fama militoperaco "Ŝtormo" (kroate: *Oluja*), okazinta inter la 4-a kaj 7-a de aŭgusto 1995, kaj la ĝin anticipinta "Fulmo" (kroate: *Bljesak*), finiĝis en 1995 la milito per la kroata venko, kio signifis ankaŭ la ŝtatan libereco por Kroatio. La lasta milita-polica operaco, en kiu en la kroata flanko partoprenis proksimume 200.000 homoj, kaj la militfronto estis preskaŭ 700 kilometrojn longa kaj okupis pli ol 18 procentojn da kroata teritorio, sukcese finiĝis en daŭro de malpli ol 84 horoj.

Hodiaŭ, du jardekojn post la fundamenta decido pri sendependiĝo, kiam la mondo kaj la mondaj grandŝtatoj prognozis, ke Kroatio kapitulacos post du aŭ maksimume kvar semajnoj, ni havas proksimuman bilancon de la milito: 13.500 pereintoj, 54-procente milite atakita kaj detruita ŝtata teritorio, 26 procentoj da okupita teritorio kun 236 miliardoj da kunaĵoj (proksimume 32 miliardoj da eŭroj) de diversaj damaĝoj.

Sed, oni devas iri antaŭen! La 1-an de aprilo 2009 Kroatio fariĝis membro de NATO kaj ĉi-jare estis finitaj intertraktadoj pri aliĝo de Kroatio al Eŭropa Unio, kiel bela donaco por ĝia dudeka naskiĝŝtago.

La 25-an de junio 1991 Kroatio proklamis sian sendependecon, sekve do ĉi-jare kroataj festas du jardekojn de tiu evento, respektive du jardekojn de Kroatio.

Kiel multaj aliaj landoj, ankaŭ Kroatio travivis malfacilajn militajn momentojn inter 1991 kaj 1995. Tiun periodon kroatoj nomas Patrolanda milito (kroatingve: *Domovinski rat*). Batalante por sendependa Kroatio, pereis ankaŭ pluraj kroataj esperantistoj. Memoron pri ili konservu ĉi-tiu artikolo.

**Josip Vranić** pereis nur 21-jara kiel maristo-gvardiano la 24-an de septembro 1991 dum la bombardado de urbo Split. Li naskiĝis en la jaro 1979, vivis en la vilaĝo Plastovo en postborda regiono de Split, kaj esperantistiĝis kiel studento de ekonomika fakultato en la jaro 1982. Li estis membro de Esperanto-societo "Frateco kaj unueco" en Split.

**Predrag Daković** - **Pero** estis kuracisto. Li naskiĝis la 23-an de julio 1948 en Zagrebo, kie li vivis ĝis 1975. Li diplomigiĝis ĉe la Medicina fakultato en Zagrebo en 1973. Inter 1975 kaj 1980 li praktikis kiel kuracisto sur la insulo Iž apud Zadar, kaj ekde 1980 laboris en la zagreba Stacio por urĝa medicina helpo. En 1974 li geedziĝis kun Mladenka Raić. Li esperantistiĝis en 1966 kiel mezlernejano. C-ekzamenon li faris en Szeged (Hungario) en 1967 kaj komencis gvidi A-kursojn enkadre de instrufako de Studenta Esperanto-Klubo (SEK) en Zagrebo, kie li aktivis dum siaj studentaj jaroj. Estinte membro de Drama sekcio de SEK, li partoprenis en programoj okaze de diversaj Esperanto-renkontiĝoj (UK en Beogrado en 1973, IJK en Kuopio, Finnlando en 1972, IJK en



# KROATAJ ESPERANTISTOJ MILITVIKTIMOJ (1991-1995)



*Josip Vranić*



*Predrag Đaković*



*René Matorušek*



*Zlatko Brajer*

Sarajevo en 1973). Li kunlaboris en "Jes, sed..." gazeto de SEK per prozaĵoj kaj tradukaĵoj kaj helpis realigi pupteatrajn internaciajn festivalojn (PIF) en Zagrebo. Li pereis dum la Patrolanda milito kiel kuracisto de Kroata armeo, en la vilaĝo Korače ĉe Derventa, la 8-an de septembro 1992.

**René Matorušek** naskiĝis en Vukovar la 7-an de februaro 1958. Samurbe li finis elementan lernejon kaj gimnazion. En 1977 li translokiĝis al Velika Gorica kaj studis stomatologion en la Stomatologia fakultato en Zagreb. Intense li okupiĝis pri komponado, teatro, literaturo. Li

*✍ Josip Pleadin*

estis talenta juna poeto verkinta memstaran kroatlingvan poezi-libron "Jaka veza" (Forta ligo, 1980). Li esperantistiĝis en 1979, estis vicprezidanto de Esperanto-societo en Velika Gorica (fondita en 1979), kaj ekde 1981 ĝia prezidanto. Li membris ankaŭ en la Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo, ludante en ĝia Drama sekcio. Fondinto de Muzika sekcio de SEK. Liaj poemoj en Esperanta traduko aperis en libreto "Albatros-poemaro", tradukita de Nikola Rašić (Zagreb, 1982). Antaŭ la Patrolanda milito li translokiĝis al sia naskiĝurbo Vukovar, partoprenis en ĝia defendo dum la milito kaj pereis kiel militviktimo. Liaj restaĵoj estis trovitaj en amastombo en Vukovar, identigitaj kaj enterigitaj nur la 22-an de novembro 2002, 11 jarojn post la morto.

**Zlatko Brajer** naskiĝis la 3-an de julio 1939 en la konata kroata enklavo, vilaĝo Janjevo en Kosovo. Laŭ profesio li estis ekonomika teknikisto, laste laborinta en la firmao "Medika" en Borovo naselje (parto de Vukovar). El sia laborloko, li estis forforte forkondukita al serba koncentrejo Begejci, kie li estis mortinta pro torturado la 3-an de decembro 1991. Aktive pri Esperanto li okupiĝis inter 1960 kaj 1985. Li estis membro de Esperanto-societo "Fratoj Ribar" en Borovo.

Religie

# Ankoraŭ pri la IKUE-kongreso

 Tiziana Fossati

Janos Kirsch. La juna germano Stefan Lepping akompanis, ĉe la orgeno aŭ per gitaro, la kantojn de la mesoj kaj de la laŭdoj, kaj estris ĉiujn aliajn kantadojn de la kongresanoj. Lia muzikemo instigis nin kanti kun li ankaŭ en la distraj momentoj.

Dimanĉon matene, post la matenmanĝo kaj la matenaj laŭdoj, ni arigis en salono de la kongresejo por renkontiĝi kun la emerita profesoro Ivan Golub, teologo kaj poeto, kiu parolis al ni pri siaj renkontiĝoj kun la jama kardinalo Ratzinger.

Carlo Sarandrea legis fine, kelkajn liajn poemojn ĉerpitaj de lia poemaro "Lumo kaj Ombro" ĵus tradukita en Esperanton.

De sabato la 16-a ĝis sabato la 22-a de julio 2011, okazis en Zagrebo la 64-a kongreso de IKUE ĉe la Ĉefepiskopa Granda Seminario lokita tuj flanke de la Katedralo.

Temo de la kongreso estis: **"Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos"**. (Luk 21, 17-18)

Aliĝis trideko da personoj el pluraj landoj (Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio, Pollando, Slovakio kaj Rusio). La grupo plej multenombra estis la itala kun 14 aliĝintoj kaj 11 partoprenantoj.

La kongreso komenciĝis sabaton vespere per Sankta Meso en la seminaria kapelo de la Plej Sankta Koro. Dum la tuta kongreso niaj tri pastroj, p. Lajos Kóbor, fr. Pierluigi Svaldi kaj p. Luigi Alfano, kuncelebris ĉiujn mesojn asistataj de diakono



Eksterprograme venis la help episkopo Ivan Šaško, kiu parolante en Esperanto, alportis la salutojn de la episkopo de Zagrebo, kardinalo Josip Bozanić. Poste ni eliris por viziti la apudan Muzeon de la beata kardinalo Alojzije Stepinac, kie fratulino rakontis la vivon kaj la travivaĵojn de la kardinalo kaj priskribis la aĵojn kaj la dokumentojn garditajn en la Muzeo.

Posttagmeze, post la Sankta meso en la Katedralo, okazis la solena inaŭguro de la kongreso en la salono de la seminariejo kun la interveno de reprezentantoj de kroataj katolikaj asocioj kaj movadoj kiuj sin prezentis.

Ni povis aŭskulti prelegojn de Branko Kobar, prezidanto de la Kroata katolika unuiĝo de instruistoj; de Đurda Arbutina, franciskana de la tria sekulara ordeno, pri la Spirito de Asizo; de Jelica Stipaničev Mustapić kaj Anica Math de la Kroata unuiĝo de la katolikaj flegistinoj kaj medicinaj teknikistoj pri sano kaj malsano en la mesaĝoj de Johano Paŭlo II; de Nikolina Delaš de la Unuiĝo de la katolikaj skoltoj pri la skoltismo, kaj fine la IKUE-prezidanto Miloslav Šváček atestis pri la kontraŭreligia persekuto en



Ĉeĥoslovakio dum la 1970-aj jaroj.

London ni havis tuttagan pilgrimadon. Unue ni atingis Ludbreg kie en la jaro 1411 (do antaŭ 600 jaroj) okazis eŭkaristia miraklo. Tie ni partoprenis en la Meso en la paroĥa preĝejo kaj vizitis la novan pilgrimlokon. En Kroatio Ludbreg estas konsiderata la centro de la Mondo, pro tio ni faris fotojn ĉirkaŭ la bronza ronda plato centre de la placo, kiu indikas la centron de la mondo.

De tie ni veturis al "Mariapoli Faro" de Križevci, urbeto de la Fokolarmovado, kie ni tagmanĝis sub granda gazebo kaj vizitis la aligitan belegan grek-katolikan preĝejon.

Posttagmeze ni atingis la kastelon de Vrobovec por renkontiĝi kun la gastoj de la komunumo "Cenacolo", fondita en 1995 de itala monaĥino (patrino Elvira el Saluzzo) por la rekupero de droguloj. Ni tie recitis rozaron kun la junaj viroj promenante laŭ riverbordo, poste ni vespermanĝis kune kun ili kaj kantis kelkajn el niaj kantoj bondezire al ili.

Mardon matene, post rozario antaŭ la bildo de la Virgulino ĉe la "Ŝtona Pordo" de Zagrebo, ni havis la ĝeneralan kunsidon de IKUE dum kiu la ĝenerala sekretario Carlo Sarandrea raportis pri la agado de la Centra Oficejo kaj de la landaj sekcioj, la financaj aferoj, la nova statuto de IKUE kaj la problemoj ligitaj al la IKUE-domo en Romo. Dum la diskuto oni parolis pri la venontaj balotoj por la elekto de la nova estraro kaj pri la ebleco elekti italon kiel novan prezidanton. Pri la venonta ekumena kongreso oni decidis rezigni la proponon de KELI kongresi en Germanio, ĉar la proponita loko estas malfacile atingebla, kaj proponi al ili elekti inter Sassone (Italio, apud Romo) aŭ Miskolc (Hungario). Por la IKUE-kongreso 2013 oni proponis la urbon Wadowice en Pollando, naskiĝloko de Johano Paŭlo II.

Posttagmeze ni veturis al Krašić, kie naskiĝis kaj mortis la beata kardinalo Aloizije Stepanic. Tie ni partoprenis en la Sankta Meso kaj vizitis la memorĉambro

kie la kardinalo mortis.

Tuj poste ni atingis Stojdraga traveturante grandan kaj belegan arbaron ĉe la landlimo de Slovenio. Tie ni vizitis la "Muzeon de uskokoĵ" kaj la grek-katolikan preĝejon de Sankta Georgo sur la supro de monteto. La pastro mem preparis al ni vespermanĝon. Ĉe tabloj, aranĝitaj ekstere sur la herbejo, ni gustumis tipan lokan pladon: specon de gulaŝo kun viandopecoj, terpomoj kaj pastobuletoj.

Merkredon, post la Sankta Meso en la kapelo de la kongresejo, ni havis vicon de prelegoj. Komence prof. Božidar Nagy parolis pri la beata Ivan Merz kaj la interreligia dialogo; sekve la slovaka IKUE-ano Pavol Petrik parolis pri la persekutado kontraŭ la Grek-katolika eklezio en Slovakio dum la komunisma reĝimo; la siberia IKUE-anino Marina Stepančeva parolis pri la "katolikoj en Siberio", fine el Kamerunio, mons. Gabriel Anda, estrarano de IKUE kaj direktoro de la tiea Radiomaria, prelegis per skajpo pri la evangelizado per komunikiloj. Posttagmeze estis libera tempo dum kiu multaj el ni vizitis la urbon.

Ĵaŭdon matene, post la Meso, estis alia vico de prelegoj. P. Tomislav Glavnik o.f.m., specializanto pri la kanona juro parolis pri la laikaj organizoj en la Eklezio.

La kroata parlamentano Marjiana Petir parolis pri sia engaĝiĝo en la antaŭenigo de la kristanaj valoroj en la kroata parlamento kaj pri la kontraŭstaroj kaj minacoj estigitaj kontraŭ ŝi pro tio.

Nia diakono Janos Kirsch parolis pri la hungaraj martiroj en la 20-a jc.

La primicanto Dario Paviša parolis pri la kroataj beatuloj kaj sanktuloj (laŭ la loka diro, "primicanto" estas nov-pastro, kiu ankoraŭ ne celebris sian unuan Meson; laŭ la loka kutimo, post la tagmanĝo, en la kapelo, li donis, al ĉiu el ni aparte, sian "primican benon").

Posttagmeze, Miloslav

Šváček montris lumbildojn pri la pasinta kongreso en Parizo kaj pri la Bibliaj tagoj en Werl, kaj Carlo Sarandrea instruis nin pri interreta etikedo.

Poste ni atingis la Bazilikon de la Plej Sankta Koro de Jesuo en Zagrebo por reciti rozaron ĉe la tombo de la beata Ivan Merz.

Vendredon okazis tuttaga pilgrimo al la diocezo de Sisak, kie ni renkontiĝis kun la episkopo monsinjoro Vlado Košić, kiu ĉe nia alveno regalas nin per trinkaĵoj, poste en dioceza salono li prelegis pri la diocezo de Sisak kun aparta rilato al la kortuŝaj eventoj de la civila serba-kroata milito de la 1990-aj jaroj de li mem travivitaj kiel paroĥestro de ĉelima paroĥejo. Fine de la prelego ĉiuj ricevis lian libro-ateston "Paroĥestro ĉe la unua frontlinio" Esperantigitan de Marija Beloŝević. Poste ni eniris la katedralon por la Sankta Meso celebrata en Esperanto de la episkopo kune kun niaj pastroj. Fine de la Meso ni veturis al bieno de la diocezo kie, ni tagmanĝis kune kun la episkopo mem. Posttagmeze la episkopo akompanis nin al fortikaĵo de Sisak, ĉe la kunfluo de la riveroj Kupa kaj Sava, kie, en la jaro 1593 okazis fama batalo, en kiu la kristanaj trupoj sukcesis venki kontraŭ la turkoj. Vespere okazis la kutima amuza adiaŭa vespero, kiu tradicie fermas niajn kongresojn.

Sabaton, post la fermo de la kongreso, ĉiuj pretiĝis por rehejmeniri. Konklude, la laboroj de la kongreso, la pilgrimadoj kaj la turismaj vizitoj estis intensaj, amuzaj kaj ankaŭ kortuŝaj. Pro tio ni devas danki precipe Marija Beloŝević pro ŝia granda organiza laboro. Ankaŭ la vetero estis ĉiam agrabla. Ni ĝuis bonan kongreson. Fina surpriza rimarko por la italoj: la prelegantoj ne IKUE-anoj prelegis en la kroata kun simultana traduko fare de Marija Beloŝević, sed preskaŭ ĉiuj el ili scipovis la italan, pro tio en kelkaj momentoj ŝajnis al ni partopreni kvazaŭ en UECI-kongreso.

# SUBJEKTIVECA RAPORTO PRI LA 96-a UNIVERSALA KONGRESO



**Taeko Osioka**

*La aŭtorino de la raporto kun sia japana amikino en la UK en Kopenhago.*

Ĉiun UK-on antaŭas grandegaj faka organizado kaj sindediĉa libervola laboro, kiu daŭras ankaŭ post la evento. Por la kongresanoj tamen la UK estas festo unusemajna. Ili elektas el la vasta ofertotio, kion ili deziras kaj povas digesti kaj enmeti en sian propran horaron. Neniu kapablas plene profiti kaj elĉerpi la programon. Multon vi vidos ĉe <http://esperanto.com/uk2011>, kie aperas ekzemple la 6 numeroj de la Kongresa kuriero "Vikinga voĉo". Tie vi legu pri la *Kleriga lundo* kaj pri la *Tago de lernejo*. Serĉante vi trovos ankaŭ fotarojn en la retejo. Jen kelkaj miaj impresoj kaj travivaĵoj dumkongresaj.

## LA KONGRESEJO

Ĝi estis moderna nova *Bella Center* sur la insulo Amager, ĉ. 4 km de la urbocentro. Ĉirkaŭe etendiĝas la verdaj pulmoj de la ĉefurbo: densaj arbetaroj kaj arbedoj, herbejoj florantaj, bonodorantaj. Apude staras maje malfermita hotelo *Bella Sky*, per koridoro konektita kun la kongresejo. Ĝi konsistas el du 22-etaĝaj turoj, arkitektura mirindaĵo, ĉar la bazo estas pli mallarĝa ol la supro kaj la turoj

*Raita Pyhälä (Saliko)*

iom tordiĝas. Proksime rotacias gracia ventelektrejo. Danio ja estas ebena lando konsistanta el duoninsulo kaj pli ol 400 insuloj, kie maro neniam malproksimas pli ol 50 km kaj kie ventoj fortas. La salonoj de la kongresejo estis komfortaj, facile troveblaj, kun ĉiaj modernaj teknikaj helpiloj. Ili portis la nomojn de Zamenhof, Canuto, Friis, Hodler, Kehlet, Lapenna, Neergaard, Noll, Privat, Skeel-Giorling, Thorsen, Vermaas, du Zachoj. Ankaŭ kafejoj kaj restoracioj troveblis, sed la prezoj fortimigis la kongresanojn, kies monujo ne dikplenis.

## LA SOLENA INAŬGURO

Sur la ekrano en la antaŭo de la salono Zamenhof montriĝis filmo pri afrikanoj kun esperantaĵoj, gaje kantantaj, bele marŝantaj, junaj, aktivaj. Inter la kongresanoj tamen ne vidiĝis multaj aliĝintoj el tiu kontinento. Mi atentis la salutantojn. Povus esti salutoj el 66 landoj, sed dudeko da landoj ne salutis. Okazis vizaj kaj financaj problemoj, malsukcesoj. Mankis reprezentantoj el orienta Eŭropo, Irano, Balkanio, suda kaj centra Ameriko ... La reprezentanto de Norvegio salutis larmante pro la ĵusa amasmurdo en sia lando: "Nur amo povas venki malicon kaj malamon. Amu!" Pro la tragedio ĉiuj ekstaris por silenta memormomento. Longa danlingva parolado de iu organizo ekĝenis la aŭskultantojn sed venis la traduko kaj klarigo, ke Esperanto lasas lokon al ĉiuj lingvoj. La temo de la UK: *Proksimigo de kulturoj*.



**Sylvia Hämäläinen**

*Sirkka Mattlin, Jomo kaj Saliko en la UK en Kopenhago*





 Joaquim J. Mariano



## MOVADA FOIRO = INTERKONA VESPERO

Kolora brua tumulto ĉirkaŭ kaj preter la budoj de multegaj organizaĵoj, asocioj, eldonistoj, aktivistoj. Fotado, ĝojo, scivolemo, surprizaj kaj sopiritaj renkontiĝoj.

## NACIA VESPERO

En la fama kopenhaga amuzejo *Tivoli* ni estis regalataj per pianludado, kantado, pantomimo, baletoj. Unika ŝanco aŭdi kaj vidi la amatoran Inuitan koruson *Aavaat* en ties admirindaj tradiciaj vestoj. Poste vagado sub diverskoloraj lampoj, tra floraj kaj parkaj aleoj, preter fontanoj, trans akvoj.

## LIBROSERVO KAJ AŬTORAJ DUONHOROJ

Dumkongrese dudeko da Esperanto-aŭtoroj prezentis sin en la Libroservo, kie staris tablegoj kovritaj per ĉiaj verkoj, diskoj kaj aliaj materialoj. Se nur sufiĉas la mono kaj la spaco en la valizo, la tempo por tralegi!



 Joaquim J. Mariano

## PRELEGOJ PRI DANIO

La prelegoj konatigis la aŭskultantaron ekz. kun dana triopo de fizikistoj, kun la fabelisto H.C. Andersen, la Vikinga epoko (la 8-a -11-a jarcentoj), Martinus-filozofio, danaj kortumoj. Vidinda estis la zorgeme preparita diaprogramo kaj prelego pri Gronlando. Kompreneble okazis kurso pri la dana lingvo.

## URBA AKCEPTO

Centoj da diverslandaj kongresanoj estis invititaj al la Urbodomo, kie la gekelneroj surtabligis

fruktojn, malvarmajn trinkaĵojn kaj farcxitajn krespoduonojn, rozobukedojn en vazoj. Tio tre refreŝigis en la varmega vetero. La tabloj rapide malpleniĝis. Mi malfruis, ne aŭdis la paroladon de la vic-urbestrino. Mi serĉis mian vojon en la urbocentro kaj malfruis ankaŭ al la kariljona koncerto en la preĝejo de la sankta Spirito. Preĝejoj kaj preĝejeccaj konstruaĵoj ja abundas en Kopenhago. La koridorojn de la urbodomo interese ornamas blazonoj ĉe la plafono.

## INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

Kiaj mult-temaj prelegoj, nun poste haveblaj kiel presitaĵo: La profundo de la ĉielo (la ŝanĝiĝo kaj evoluo de la homa kompreno pri la universo), astrobiologio, danĝera kaj utila oksigeno, revigliĝo de hebrea lingvo, minaco de HIV al tutmonda junularo, Zamenhofaj revoj, interlingvistika laboro de Otto Jespersen, maŝintradukado ... Nur kelkaj el la prelegantoj tro multe uzis bildojn kaj tekstojn projekciatajn sur grandan ekranon malantaŭ sia dorso. Se la vidaĵoj ŝanĝiĝas tro rapide, la publiko laciĝas. Memoru ke nenio povas anstataŭi la viglecon de la homa preleganto, ties vivan uzon de siaj voĉo kaj korpo, mienoj por la sukceso de la prelego.

## PAROLIGAJ EKZERCOJ, LINGVOLERNADO, KER- EKZAMENOJ

Jes, partoprenu! Profitu! Dankinda laboraro de Katalin Kováts kaj aliaj, de ILEI, de Lernu!

## EKSKURSOJ

El la ekskursoj mi elektis konatiĝon kun Kopenhago, vizitadon de la Vikinga muzeo en Roskilde kaj la Muzeon pri H.C. Andersen en Odensee, Fyne-insulo. Ambaŭ plene kontentigis min. En la andersena muzeo estas montrata tuta lia vivo, liaj verkoj kaj ties tradukoj, lia epoko, papertondaĵoj faritaj de li, liaj vestaĵoj kaj gustoj ... Sur malgranda suna scenejo geknaboj prezentis andersenan teatraĵon. Homoj spektis, piknikante sur herbejo. Apude viziteblis folkora kaj agrikultura muzeo pri kampa vivo en la 19-a jarcento kun tradiciaj domoj, laboriloj, dombestoj, odoroj, ĝardenoj, manlaboraĵoj, metioj ... Se interesas vin, vidu [www.odensee.dk](http://www.odensee.dk).

En la Vikinga muzeo oni montras la pokajn restaĵojn de la ŝipoj, la arkeologiajn laboron pri ili, rekonstruitajn modelojn kaj verajn ŝipojn sur la maro, vilaĝojn kaj vivmanieron de tiu epoko, filmojn. Impona estis la filmo pri la velado de la ŝipo "Mara Virĉevalo de Glendalough" al Irlando, en 2007-2008, kun 65-membra ŝipanaro. Oni povis kun ili travivi la malfacilaĵojn de la marvojaĝego. Vikingoj estis ne

nur militistoj kaj rabistoj sed ankaŭ terkultivistoj, fiŝkaptistoj, simple homoj kiuj siamaniere provis vivteni sin kaj plilarĝigi sian mondon. Vidu [www.roskildemuseum.dk](http://www.roskildemuseum.dk). Samekskurse ni vizitis la mezepokan katedralon de Roskilde, kiu siatempe tre gravis por la tuta Skandinavio kaj Baltio.

## TEATRAĴOJ, FILMOJ, KONCERTOJ

Ne pri ĉio rakontebblas.

### INTERNACIA KORUSO

La koruso sub la gvido de Alan Bishop sukcesis kunmeti ĝuindan koncerton en nur kelkaj laborplenaj tagoj. I.a. kortuŝe kantis Juan Angulo Hernandez el Kubo. Lia dika iom aspra voĉo konvenas al kantoj pri la monda maljusto. Tamen li ripetis: Ne ploru ... estas la vivo. La koruso per anonco en la kongresa kuriero trovis por si bonan akompaniston.

### FARANDOLO

Tra la urbaj stratoj gaje marŝis 60-100 kuraĝuloj, kun blanka tuko ĉirkaŭkape kaj la nomo de sia gepatra lingvo pentrita sur ĝi. Ili kontaktiĝis kun la homoj survoje, petolis kaj malsekiĝis en la pluvo. "Publiko magris ... sed gaja etoso viglis, kantoj kaj ridoj abundis" (laŭ KN 141).

### AKCEPTO DE LA SOCIETO ZAMENHOF

En la 23-a etaĝo de *Bella Sky*: kuraĝigaj kaj dankaj paroladoj, fruktoj kaj legomeroj, trinkaĵoj, kafo kun kuketo sed antaŭ ĉio vasta vidaĵo el la fenestroj ĝis la fora urbocentro en la horizonto, vidaĵo ankaŭ sur la apudan junularan gastejon *Danhostel*, kie tranoktis kelkaj kongresanoj inter la partoprenantoj de biciklista konkurso samtempe okazanta.

### INTERNACIA ARTA VESPERO

Ĝuinda kombinaĵo de ĉiaj muzikoj. Tradicia dancado el Nepalo, belvestaj nepalanoj flirtis sur la scenejo kiel malpezaj buntaj papilioj, ankaŭ la fingroj de la virinoj dancis. Vice solena eŭropstila kantado. Petoladoj de modernaj ensembloj. Kortuŝaj kantoj pri amo kaj sufero. La programo daŭris ĝis post la 22-a horo. Supozeble aŭdatis io por ĉiu gusto.

### NOVAJ HONORAJ MEMBROJ

Detlev Blanke, Renato Corsetti, Rob Moerbeek.



### REZULTOJ DE BELARTAJ KAJ ORATORA KONKURSOJ

POEZIO: Unua premio: Jorge Camacho Cordón (Hispanio) pro "Sezonoj"; Dua premio: Ulrich Becker (Usono) pro "Adiaŭa festo"; Tria premio: Jorge Camacho Cordón pro "Lokoj"; Honora mencio: Aleksandro Mitin (Rusio) pro "Vivhorloĝo".

PROZO: Unua premio: ne aljuĝita; Dua premio: Sten Johansson (Svedio) pro "Brokante"; Tria premio: Sten Johansson pro "Nova amiko de Sinjoro Brunner"; Honora mencio: Ulrich Becker pro "Malapero de knabo".

ESEO: Premio "Luigi Minnaja": Davide Astori (Italio) pro "La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado"; Dua premio: Jan Werner (Ĉeĥio) pro "Konfuzigaj faktoroj en lingva komunikado"; Tria premio: Filippo Franceschi (Italio) pro "Post legado de 'La mava lingvo'"; Honora mencio: Adrienne Pásztor (Hungario) pro "Tutmondaj defioj de la klimatsanĝiĝo".

TEATRAĴOJ: Unua kaj Dua premioj : ne aljuĝitaj; Tria premio: Doron Modan (Israelo) pro "Justa juĝo"; Honora mencio: João José Mendes Quiterno dos Santos (Portugalia) pro "Aŭtodafeo"; Honora mencio: Georgo Handzlik (Pollando) pro "Kompleta (preskaŭ) historio de Universalaj Kongresoj de Esperanto".

KANTO: Premio "An-okin pri Kanto": ne aljuĝita; Dua premio: Rogerio Borges kaj Eric Languillat (resp. muziko kaj teksto; Francio) pro "Tatua Papil"; Tria premio ne aljuĝita.

FILMO: Unua premio: Roman Dobrzyński (Pollando) pro "Japana pritempo - Oomoto 2009"; Dua kaj Tria premioj: ne aljuĝitaj.

INFANLIBRO DE LA JARO: "Avo Paŭlo", verkita kaj eldonita de Margrit Vollertsen-Diewerge, trad. Pit Hauge (Germanio).

...

Mi plene ĝuis la kongreson sed ne povis ĉion noti, kaj ankaŭ vi ne povus ĉion legi sen tediĝi!

# NI VENIGU LIN AL NI EL LA MALLUMO!

✍ Mikaelo Bronŝtejn



*“Ho, se mi povus oferi mian mizeran vivon  
por la feliĉo de la homaro!”*

*Vasilij Jeroŝenko*

En la dua, kaj dume la lasta, eldono de “Esperanta Antologio” (Rotterdam, 1984) Vasilij Eroŝenko estas prezentita per ununura poemo “Antaŭdiro de la ciganino”, kvankam kelkaj biografiaj linioj pri li en la fino de la sama Antologio mencias sep librojn, verkitajn de li kaj eldonitajn en Esperanto. Jen estas la unua enigmo por mi: kial nur unu poemo? La unua enigmo, sed kiom da ili estas?! Ombroj, nebulaj kaj lokoj entute mallumaj abundas tra la tuta biografio de tiu genia blindulo. Ŝajnas al mi, ke estas ĝuste ni, esperantistoj, kiuj plej fervore esploru la vivon de unu el la plej elstaraj anoj de nia popolo, sed ja estas ĝuste ni, esperantistoj, kiuj preskaŭ plene ignoras tiun esploradon. Pro tio en kelkaj biografiaj artikoloj, kiujn mi trovis en la reto, la aŭtoroj eĉ ne mencias lian esperantistecon ...

Antaŭ kelkaj jardekoj, interesiĝinte pri la personeco de Vasilij Jeroŝenko (laŭ mi tiu formo de lia familinomo estas pli ĝusta), mi komencis kolektadi liajn verkojn kaj verkojn pri li. En 2004 mi havis kelkajn liajn librojn, eldonitajn en la rusa kaj ukraina lingvoj, kelkajn artikolojn, aperintajn en rusaj revuoj kaj almanakoj kaj dokumentitan novelon de

konata esperantisto Aleksandr Ĥarkovskij “La homo, kiu vidis la mondon” (Moskvo-1978). La tutan kolekton mi donacis al la ukraina esperantistino Julia Patlanj, verŝajne la sola, kiu nun esploras la vivon kaj verkojn de Jeroŝenko. Eblas vidi ŝian laboron (bedaŭrinde, nur ruslingve) en [www.eroshenko-epoko.narod.ru](http://www.eroshenko-epoko.narod.ru)

Sed eĉ tiu ĉi fonto, laŭ mi tre fidinda, enhavas ombrojn kaj nebulojn. Pro tio por ĉiu serioza interesiĝanto la ĝisnunaj biografioj de Vasilij Jeroŝenko ne prezentas respondojn al la demandoj, jen kaj jen aperantaj. Eĉ la membiografio, kiun oni povus opinii beletra verko.

Do, Vasilij, la dua filo de Jakov Jeroŝenko, naskiĝis en vilaĝo Obuĥovka de Kurska gubernio la 31-an de decembro 1889, malnovstile. Aŭ la 1-an de januaro 1890? Kutime oni baze de la novstila dato (12-a de januaro 1890) indikas ĝuste 1890, kiel la jaron de lia naskiĝo.

Dum kvar jaroj li estis vidanta la mondon, poste la morbo provokis blindiĝon. Tio estas fakto. Pruvita fakto estas ankaŭ, ke naŭjara Vasilij trafis la lernejon por blindaj infanoj en Moskvo. Estas vera bonŝanco, ĉar tute ne multis tiaspecaj lernejoj en la antaŭjarcenta Ruslando. Se lia patro estis riĉa bienulo, la afero estas komprenebla. Sed la biografiistoj prezentas la patron kiel ordinaran kamparanon ...

En 1911, jam estante muzikisto de restoracia orkestro en Moskvo, Jeroŝenko ellernis Esperanton. Lia Esperanto-baptintino estis Anna Nikolajevna Ŝarapova, fratino de Lev Tolstoj – skribas certa biografiisto. Absoluta stultajo. Anna Ŝarapova (1860-1923), vere estis aktiva esperantistino kaj tradukisto, sed nenian parencon rilaton ŝi havis kun la familio de Tolstoj. Tamen ne gravas tio, gravas ke post monata lernado, Vasilij jam parolis la lingvon. Tion mi volonte kredas kaŭze de postaj informoj pri elstaraj lingvistikaj kapabloj de la junulo. Ekde 1911 li membriĝis al Moskva Esperanto-societo, ligita al la fama revuo “La Ondo de Esperanto” de A. Saharov. Kiom aktive li vizitadis la kunvenojn? Ĉu li aktivis tie, ĉu koncertis? Mankas respondo, sed “La Ondo” informas, ke en 1912 Jeroŝenko, helpata de esperantistoj en multaj eŭropaj urboj, venis Londonon kaj aliĝis al la Reĝa kolegio por blinduloj. Tio estas vero – blindaj esperantistoj el Kislovodsk (Rusio) ricevis informon de la kolegio, ke, efektive, Jeroŝenko studis tie dum du monatoj – ekde la 20-a de majo ĝis la 23-a de julio 1912. Kial nur dum du monatoj? Mankas respondo. Samkiel por la demando, kial ĝenerale li, aspirinta Brition, forlasis la landon post duonjaro.

Tamen, ankaŭ tio ne tro gravas. Gravus, ke la unua vojaĝo



eksterlanden vekis en la koro de la juna blindulo fervoran emon vojaĝi. En 1914 Vasilij Jeroŝenko atingis Japanion. Ĝuste tiu ĉi lando, laŭ diroj de Vasilij mem, iĝis lia dua patrujo, kaj la japaniaj paĝoj de lia vivo estas plej bone esploritaj. Ĝuste en tiu ĉi lando li komencis verki. Ĝuste en tiu ĉi lando en la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento aperis lia verkaro kvinvoluma. Japanlingva, kompreneble ...

Post du jaroj Jeroŝenko forlasis Japanion. Kial? Por vojaĝi – oni respondas. Ĉu vere tio estis la ĉefa kaŭzo de lia foriro? Mankas respondo, sed efektive, li, blindulo, faris mirindajn vojaĝojn al Tajlando, Birmo, Hindujo, iĝinte konato de multaj eminentuloj, i.a. R. Tagore. Ekzistas atestoj pri tio inter ne multaj detalajoj, konataj pri tiuj liaj jaroj. Sekvas plia legendo, ke la blindulo, pro kantado de revoluciaj kantoj en Kalkato, estas forigita el la urbo per brita militŝipo, sed fuĝinta en Ĉinio kaŝe, en la vesto de ĉina kulio ...

Sekvas reapero en Japanio por du jaroj, formigro al Ĉinio, amikiĝo kun Lu Sin, kiu eĉ verkis noveleton pri Jeroŝenko, nomatan "La anasa komedio". El Ĉinio en 1922 Vasilij Jeroŝenko, verŝajne, iris al UK en Helsinko.

Kial verŝajne? Ĉar lia nomo ne estas en la listo de la kongresanoj, sed estonaj esperantistoj, i.a. Hilda Drezen, atestis, ke estis vidintaj lin tie.

Tie ĉi venas alia legendo: dumvoje al Helsinko, en Rusio, Jeroŝenko lasis la luksan vagonon kaj fuĝis hejmen, trovante la vivrimedojn kiel simpla blinda kantisto, kaj vizitis la parencojn en sia hejmvilaĝo ... Post la kongreso li revenis al sia laboro en la Pekina universitato, sed en printempo de la sekvanta jaro foriris al la Patrujo. Kial? Ĉu pro persekutoj de tiutempa ĉina regantaro?

En Moskvo li trovis sian Esperanto-panjon Anna Ŝarapova, kiu rekomendis, ke li establu ligojn kun eŭropaj blindaj esperantistoj dum la kongreso en Nurenbergo. Ĉu vere? Ja ĉe la tempo de lia alveno la virino estis jam forpasinta ... Sed ankaŭ tio ne tre gravas, ĉar Jeroŝenko tamen trafis Nurenbergon, kaj tie lia poemo "Aŭguro de ciganino" ricevis premion de la Belartaj Konkursoj ...

Ho, poste la loĝlokoj de Jeroŝenko ŝanĝiĝis ofte, tre ofte, kaj ili estas atestataj nur de Jeroŝenko mem – jen Ĉukotko, kie estis verkita novelaro "El vivo de ĉukĉoj", jen Mezzusio, jen lernejo

por blindaj infanoj en ĉelandlima urbeto Kuŝka, Turkmenio... Nur post multaj jaroj li revenis al Obuhovka kaj pace forpasis tie en decembro 1952. Tio estas fakto.

Kun sincera bedaŭro mi agnosku, ke, pro mia aĝo kaj pro multaj planitaj laboroj, farendaj dum la restantaj vivojaroj, mi ne kuraĝas alfronti serĉadon de la faktoj, kiuj kompletigus mirindan kaj admirindan biografion de Vasilij Jeroŝenko. Restu tiu laboro por scivolemaj kaj malindiferentaj junuloj. Sed liaj verkoj! Ĉu estas juste, ke dum jardekoj neniu esperantista eldonejo interesiĝis pri reeldono de liaj lumoplenaj fabeloj, brilaj rakontoj kaj poemoj? Ĉu la senvuala romantikeco de tiuj verkoj hezitas la eldonistojn, ĉar ŝajnas malmoderna kaj tial nevendebla en la nuna epoko, en nia freneziga mondo?

**NOTO de J. Pleadin:**

Ankaŭ en la biografio de Jeroŝenko aperinta en "Ordeno de Verda Plumo" ekzistas grava eraro (paĝo 75): "...en 1922 li prelegis pri rusa literataro en universitato de Pekino kaj en la edukista kolegio por virinoj helpata de granda ĉina verkisto Laŭlum." Efektive la menciita "granda ĉina verkisto" ne estis Laŭlum, sed Lu Sin.



**SUBVENCIO CIGNO EN 2011  
AL DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO**

Subvencio Cigno estis starigita per donaco de la japana esperantista mecenato Etsuo MIYOSHI por subteni Esperanto-projektojn en la Tria Mondo kaj la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo. Ĝi valoras 500.000 enojn, t.e. ĉirkaŭ 4500 eŭroj. Ĉi-jare la Estraro de UEA dividis la subvencion inter tri ricevantoj, el kiuj unu estas Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurdevac, Kroatio, por plibonigi siajn materiajn kondiĉojn kaj pligrandigi siajn kolektojn. UEA publikigis tiun informon dum la UK en Kopenhago. La informon transprenis la kroata informagentejo HINA, kaj pere de ĝi ankaŭ pluraj gazetoj kaj portaloj en Kroatio. Rezulte de tio, la regiona televidkanalo Srce TV (el Ĉakovec) filmis la DEC-kolekton kaj faris intervjuon kun Josip Pleadin.



Vasilij Eroŝenko (1890-1952)

### Antaŭdiro de la ciganino

Mia kara, mia bona,  
Mia nobla belulin!  
Ciganino diras veron,  
Ciganin' ne trompas vin.

Scias mi knabinajn revojn,  
La sekretojn de la kor',  
Scias mi pri malfeliĉo,  
Scias mi pri amdolor'.

Kredas vi, ke la feliĉo  
Estas via vera sort',  
Kredas, ke belec' kaj amo  
Akompanos vin ĝis mort'.

Kredas vi, ke ne ŝanĝiĝas  
Vira amo sub la sun',  
Kredas vi, ke la amikoj  
Ne perfidas sub la lun'.

Kredas vi, sed mia kara,  
Mia nobla belulin!  
Kredu min, mi diros veron,  
Ciganin' ne trompos vin.

Daŭra amo, daŭra ĝojo  
Estas vana belesper':  
En la mond' ŝanĝiĝas ĉio;  
Ĉio pasas sur la ter'.

Pro l' amaĵ, pro la amikoj  
Venos plej malĝoja hor'.

Vasilij Jeroŝenko (1890-1952)

### Cigankino proroĉanstvo

Draga moja, dobra moja,  
Lijepa ti si meni sva!  
Ciganka ti pravo kaŝe,  
Ciganka ne vara ta.

Znam ja djevojaĉke ĉeŝnje,  
Mnoge tajne srca tvog,  
Znam ja sve o ljudskoj sreĉi,  
Znam ja boli srca tog.

Vjerujeŝ ti da je sreĉa  
Tvoje sudbe dobra kob,  
Vjerujeŝ ti kako ljubav  
Pratit ĉe te i u grob.

Vjerujeŝ ti da je stalna  
Ljubav muŝka bilo kaĉ',  
Vjerujeŝ ti u drugarstvo,  
Da te izdat neĉe sad.

Vjerujeŝ ti, draga moja,  
Lijepa ti si meni sva!  
Sad mi vjeruj, kaĉ' ti kaŝem,  
Ciganka ne vara ta.

Stalna ljubav, stalna radost,  
Pusta ti je nada sad:  
Sve se mijenja na tom svijetu,  
Sve prolazi, osta jad.

Radi dragog, zbog drugova,  
Bit ĉe mnogi gorki ĉas,



Kaj por ĉiam nur sopiro  
Restos en la juna kor'.

Mia kara, mia bona,  
Vin kompatas ciganin':  
Plej fidataj vin perfidos,  
Plej amataj trompos vin.

Mia kara, mia bona,  
Kompatinda belulin'!  
Ciganino vin kompatas,  
Sed ne povas helpi vin.

Ne ekzistas ja sorĉado  
Kontraŭ la fatala mort',  
Ne ekzistas talismanoj  
Kontraŭ malbenita sort'.

Sed memoru, ne forgesu,  
Mia kara belulin'!  
Estas io en la mondo,  
Kio ne perfidos vin.

Tio estas la ponardo,  
Tio estas mortvenen';  
Kiam ĉio vin perfidos,  
Ili estos vera ben'.

Vi memoru, ne forgesu,  
Mia nobla belulin',  
En la venĝ' ponard' vin helpos,  
Mortvenen' ne trompos vin.

Mia kara, mia bona,  
Mia nobla belulin'!  
Ciganino diras veron,  
Ciganin' ne trompas vin.

Jer ĉe uvijek vladat' ĉežnja  
I u srcu pratit nas.

Draga moja, dobra moja,  
Ciganka te žali ta:  
Jer najdraži ĉe te izdat,  
Varat ĉe te družba sva.

Draga moja, dobra moja,  
Jadna li si, znaju svi!  
Ciganka te sada žali,  
Al' ne može pomoć ti.

Ne postoji takva vradžba  
Da odvrati kob ti zlu,  
Ne pomažu talismani  
Da ublaže sudbu tu.

Imaj stalno na pameti,  
Ljepotice draga mi!  
Ima nešto na tom svijetu  
Što ĉe uvijek pomoć ti.

To je jedan dobar bodež,  
To je otrov, znanac star,  
Bilo tko te hoće izdat,  
Bit ĉe oni prava stvar.

Imaj stalno na pameti,  
Ljepotice draga mi,  
Za osvetu bodež uzmi,  
Otrov ĉe ti pomoći.

Draga moja, dobra moja,  
Lijepa ti si meni sva!  
Ciganka ti pravo kaže,  
Ciganka ne vara ta.

Na hrvatski preveo - kroatigis: Ivo Borovečki

# LA RINGLUDO DE SINJ







La ringludo de Sinj (kroate: *Sinjska alka*) estas kroata kavalirludo okazanta ĉiujare dum la unua dimanĉo de aŭgusto en urbo Sinj, je datreveno de la venko en la batalo kontraŭ turkoj, kiu okazis la 14-an de aŭgusto 1715. Tiutage 700 kroataj batalantoj el Sinj sukcesis rezisti la atakon de la armeo de turka militestro Mehmed-paŝao Ĉelić, kiu nombris 60.000 soldatojn.

La ringludo de Sinj estas kavaliira konkurado en kiu la rajdanta kavaliro sur galopanta ĉevalo devas trakuri la 160-metran kurejon en ne pli ol 12 sekundoj, kaj dum la galopo li provas per lanco trafi la mezon de metala ringo nomiĝanta *alka*, pendants je alteco de 3,2 metroj super la tero. La ringo konsistas el du paralelaj cirkloj, el kiuj la malpli granda havas diametron de 3,54 cm kaj la pli granda de 13,3 cm. La cirkloj estas inter si kunligitaj per tri stangetoj, kiuj la eksteran cirklon dividas je tri samformaj kampoj. La celo de la ludo estas kolekti kiom eble pli da poentoj dum tri provoj. Dum la kurado, sur la ringludano kaj sur la ĉevalo troviĝas kompleta ekipaĵo kaj neniu parteto rajtas defali. Se tio okazas, kaj la ringludano mem ne rimarkis tion, li rajtas ricevi permeson de la vojevodo de la ringludo, por ripeti la kuron. Se la ringludano rimarkas, ke io el la ekipaĵo defalis, li devas galopi tra la kurejo sen provo trafi la ringon, alivorte kun "mallevita lanco".

Ĉiu lanctrafo havas apartan valoron esprimitan per poentoj. La interna cirklo de la ringo

validas 3 poentojn, la supra parto de la ekstera cirklo 2 poentojn, kaj la dekstra, respektive maldekstra partoj de la ekstera cirklo po unu poenton. Ĉiu el la trafaj havas sian loklingvan nomon: la trafo en la dekstran kaj maldekstran kampojn nomiĝas *u jedan* (al unu), la trafo en la supran kampon de la ekstera cirklo *u dva* (al du), la trafo en la malgrandan cirklon *u sridu* (en la mezon). Se la ringludano maltrafas la ringon, sed se la ringo estis tuŝita, ĝi nomiĝas *u ništa* (al nenio), dum la maltrafo nomiĝas *promaŝio* (maltrafis). Ekzistas ankaŭ precedenco se la ringludano, trafinte la ringon, ĵetas ĝin en la aeron, kaj dum la galopo surlancigas ĝin. Tiukaze li ricevas la vere trafitajn poentojn plus tri poentojn aldone. Ĉiu trafo en la mezon, kaj la ringludano tion


## La 15-an de novembro 2010 la Ringludo de Sinj estis enskribita en la Unesko-liston de nemateria kultura heredaĵo de Eŭropo.

sukcesintan, glorigas la tuta ĉeestantaro, ĉar la senco de la konkurado ja ne estas ke oni venku la aliajn konkurantojn, sed pro la malfacileco de la tasko, ke oni trafu kiom eble pli ofte en la mezon, kio postulas grandan lerton kaj kapablon de la ringludano en manipulado per lanco, stirado de ĉevalo kaj akran vidkapablon. Ĉiu trafon en la mezon oni jubilas per blovmuziko kaj pafoj el malnova kanono nomata *maĉkula*.

La ringo estis uzita kiel celobjekto en la 17-a kaj 18-a jarcentoj por ekzerci la kavaleriajn lancistojn ankaŭ en aliaj partoj de Kroatio kaj en Eŭropo kie ekzistis rajdista tradicio.

La historio de la ringludo montras, ke en diversaj epokoj ĝi estis organizata je diversaj datoj, kaj ekde 1849 ĝi okazadis regule la 18-an de aŭgusto, je naskiĝdatreveno de la imperiestro Francisko Jozefo, kio estis konfirmita ankaŭ per la ringludana statuto el la jaro 1902. Ekde tiu jaro la ringludo estas organizata ĉiujare en la unua triono de aŭgusto. La aranĝon en 1818, dum sia vojaĝo tra Dalmatio, vizitis ankaŭ la imperiestro Francisko la Unua, kiu la venkinton premiis per brilanta ringo kies valoro estis taksita je 800 forintoj. Post tio ĉiujare la venkinto el Vieno ricevas 100-forintan premion, kio verŝajne estis la ĉefa instigo, ke la malnova kaj multekosta kavalludo transviis ĝis nun.

La ringludo okazas laŭ striktaj reguloj preskribitaj en la ringludana statuto kaj laŭ malnovaj kutimoj. La procesio de partoprenantoj konsistas el vojevodo, roto de ringludanoj, roto de iliaj helpantoj (sing. *momak*, pl. *momci*) kaj la sekvantaro.



La roton de ringludanoj konsistigas la konkurantoj kun sia estro *alaj-ĉauš*. La roton de iliaj helpantoj konsistigas la helpantoj frunte kun sia estro *arambaša*. La sekvantaro konsistas el ringludanoj kiuj ne konkuras: la flagisto, liaj du ĝis ses sekvantoj kaj vojevoda adjutanto; du helpantoj kiuj kondukas la ĉevalon Edek, unu ŝildportanto, du klabistoj, tri tamburistoj (*talambasaĉ*), tri trumpetistoj. La ringludanoj rajdas sur ĉevaloj, kaj iliaj helpantoj kaj la resto de la sekvantaro piediras. Pendigisto de ringo, lia helpanto, trumpetisto kaj kanonpafisto estas partoprenantoj de la aranĝo, sed ili ne paŝas en la procesio. Ili estas vestitaj per simplaj popolkostumoj. Membroj de Honora tribunalo portas solenajn nigrajn civilajn vestojn kun blua rubando sur la brusto.

Je la tago en kiu okazos la konkurado, frumatene el la fortikaĵo *Grad* pafas kanonoj *mačkule*, post kio la blovorkestro ludas vekmuzikon, pasante tra la urbaj stratoj. Post tio en la fortikaĵo kolektiĝas la ringludanoj, iliaj helpantoj kaj la popolo. Tie oni revokas la memorojn pri la heroa kaj glora venko de la popolo de Cetina-a regiono super la turkaj konkerantoj. Antaŭtagmeze la adjutanto de la vojevodo, je lia nomo, kun sia helpanto en la kaleŝo vizitas kaj invitas al la ringludo reprezentantojn de politika, armea kaj eklezia aŭtoritatoj. Du horojn antaŭ la komenco de la ringludo, tri trumpetistoj kaj tri tamburistoj el la fortikaĵo *Kamiĉak* invitas la ringludanojn kaj iliajn helpantojn kolektiĝisolene vestitaj kaj armitaj ĉe *alaj-ĉauš*. Post la kolektiĝo la *alaj-ĉauš* kontrolas la ringludanojn, kaj *arambaša* la helpantojn, kaj ĉiuj, akompanitaj de sonoj de trumpetoj kaj tamburoj, iras vizite al la vojevodo en Ringludana hejmo (*Alkarski dvori*), kie jam kolektiĝis la flagportisto, adjutanto de la vojevodo kaj sekvantoj de la flagportisto, la ĉevalo Edek, kiun dum ĉiu ringludo oni kondukas en la procesio, la ĉevalkondukantoj, ŝild- kaj klabportantoj. Edek simbolas la militakiritan ĉevalon de la turka armeestro kiu gvidis la ĉefan atakon al Sinj.

**Esperantistoj kun la ringludo konatiĝis unuafoje per la verko "Ano de l'ringludo" de kroata verkisto Dinko Ŝimunoviĉ (1873-1933), eldonita ĉe Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig en 1926. La tradukon faris Fran Janjiĉ. Ni prezentas al vi parteton el la 4-a ĉapitro.**



Kiam ekaŭdiĝis en la trankvilo la forta sono de kupra trumpeto, multaj paliĝis - unuj malfermis la buŝojn kun tre rigardegantaj okuloj, kaj iuj eĉ etendis la manojn kvazaŭ lancon kaj levis unu piedon, kvazaŭ ili mem kuros.

La bela nigrulo de Raŝica, kvazaŭ ĝi kurus unuafoje, apenaŭ tuŝis la teron en la kuro. La dolmano sur Crnoŝija flugis kvazaŭ flugilo de rabobirdo, kaj li, kun kunpremitaj dentoj kaj sulkiĝinta frunto, flugis pli kaj pli proksimen.

Iom antaŭ la ringo li levis la lancon kaj traflugigis ĝin ĝuste en la mezon, kvazaŭ li ĝin eĉ ne estus tuŝinta.

Sed tuj post tio li forte eksvingis la lancon, kaj la ringo ekflugis tra la aero antaŭen.

Terura, oni dirus, besta ekkrio, furioza kaj duonfreneza, ekaŭdiĝis de la amaso. Sed Raŝica en la sama momento, kaj ĉio en la kuro, submetis la lancon, kaptis la ringon enmeze kaj malaperis en la urba strato.

Sed nun eĉ ne voĉo aŭdiĝis. Kvazaŭ la morto per sia nigra flugilo transiras la tutan amason, ŝtopas ĉiujn gorĝojn kaj lignigas ĉiujn manojn. La muzikistoj, kiuj devis ekludi venkan marŝon, forgesis sian devon kaj ĉiu kun sia instrumento en tendita mano rigardis tiun miraklon kaj foriris de sia loko en la mezon de la kurejo.

Tiel estis dum kelkaj minutoj, ĝis ili ekvidis Raŝica-n revenanta, ŝvitanta kaj ruĝa, kaj la lanco iomete tremis en lia mano. Oni vidis, ke ankaŭ li estas kortuŝita.

Sed nun, kiam ili lin ekvidis, la popolo kvazaŭ freneziĝis. Iuj komencis eĉ plori, kaj iuj frapis per la piedoj kaj ĵetadis ĉapelojn kaj ĉapojn aeren.

La popolo elrapidis de siaj lokoj kaj ne estis forto, kiu ilin povis haltigi. Kaj fariĝis terura tumulto kaj tia furiozeco, ke ĝi trankviliĝis apenaŭ tiam, kiam aŭdiĝis malespera ploro de virinoj kaj krio de timigitaj infanoj.

- Kio okazis? - ili demandis unu la alian.

Kaj ĉiuj kvazaŭ ebriaj ŝanceliĝis kaj sin ŝovis al siaj lokoj, antaŭ la bajonetoj de l' ĝendarmoj. ►

# PRI KIO REVAS ARBOJ – KONKURSO DE JUNA AMIKO

Arbaro asocias en mi ripozon en herbejo inter arboj kun proksimeco kaj beleco de la naturo, kantado de birdoj, susurado de folioj, sed ankaŭ magion kun koboldoj kaj infanaĝon. Estas ankaŭ aliaj asociadoj: poluado, hakado de arboj ...

Pensante pri arbaro, ni ofte forgesas pri la grava funkcio, kiun ĝi plenumas, nome ke ĝi ensorbas karbonan dioksidon el la atmosfero, kio kontraŭagas la forcejan efikon. Ni ne pripensas, kiom da arboj oni devas planti por ekvilibrigi la kvanton de karbona dioksido, kiun emisias niaj aŭtoj ...

Unuigintaj Nacioj proklamis la jaron 2011 **Internacia Jaro de Arbaro**. Nehazarde en la centro de la logoo troviĝas homo kaj la ĉefa slogano de la kampanjo estas *Arboj por homoj*. Necesas konsciigi al ni mem kiel grandan signifon havas arbaroj en nia vivo. Simile al la arboj, ni ankaŭ estas parto de la naturo kaj ni ne povas ignori iun ajn el ĝiaj partoj. De ni dependas, ĉu la arbaroj estos bazo de nia prospero aŭ ni venigos la mondon al ekologia katastrofo.

Ekzistas firma ligo inter sanaj arbaroj kaj sana medio. Ni devas ekkonscii kiel gravegan signifon havas arbaroj en nia vivo kaj ilia protektado estu grava por ĉiu el ni. Arbaro estas la tereno de aro da vegetaĵoj, ĝi havigas al ni lignon, medikamentojn kaj aliajn vivbezonaĵojn, mildigas la klimatajn kondiĉojn kaj estas gravega

akvocirkula reguligilo kaj produktanto de oksigeno.

Sistema ekstermado de arboj kaŭzas inundojn, erozion de grundo, morton de vegetaĵoj, bestoj, birdoj, insektoj ... ofte raraj kaj protektataj.

Neripetebla beleco de arbaro inspiras al arta kreado, sed ĝi ankaŭ edukas infanojn kaj gejunulojn ami la naturon.

La revuo **Juna Amiko** aliĝas al la ĉi-jara Internacia Jaro de Arbaroj kaj organizas konkurson: **Pri kio revas arboj**. Ni deziras, ke vi montru, kion donas al ni arbaro, kaj kion ni povas doni al arbaroj, por ke ili akompanu nin kiel eble plej longe. Ĉiu el ni vidas la mondon alie, do ĉies prezento estos alia, tial vi elektu liberan teknikon por via verko. Vi povas sendi foton, verki rakonton, poemon aŭ kanton, desegni aŭ pentri, aŭ uzi alian teknikon.

Valoraj premioj atendas vin. Sendu viajn laboraĵojn kun indiko: **Konkurso - arbaro** ĝis la fino de la jaro 2011 al la adreso: **Silezia Esperanto-Asocio, str. Stanisława Dubois 3/1, PL 50-208 Wrocław, Pollando**. Ne forgesu aldoni vian nomon kaj adreson.

Samtempe ni informas, ke ĉiuj konkursaĵoj estos prezentitaj en la bela ejo de la Silezia Esperanto-Asocio en Vroclavo kaj pruntedonotaj al urbaj bibliotekoj en kelkaj polaj urboj. Partoprenante la konkurson vi ne nur instigas konscienon pri la temo de la protektado de la arbaroj, sed ankaŭ vi helpas disvastigi la informojn pri Esperanto.

Małgosia Komarnicka

Rubrikestro de *Legu kaj ĜUU* de *Juna Amiko*

## INTERNACIA JARO DE ARBAROJ 2011



► Salko kvazaŭ ŝtoniĝis kaj eĉ ne alkuris al sia patro por kapti liajn ĉevalon kaj lancon, kiel estis lia devo, sed Raŝica, post kiam li estis transdoninta la ringon al la gvidanto kaj juĝantoj, malsupreniris sola kaj komencis ĉirkaŭpreni sian Arap kaj kisi ĝian ŝvitan kaj brilan kolon.

Kaj plu ne estis trankvilo.

Kvanam Alaj-heroldo kuris kaj trafis la mezon de la ringo eĉ kvaran fojon, la popolo kriis kvazaŭ furioza senĉese al la gajninto Raŝica, al kiŭ ili enkalkulis numeron ses por la nura lasta fojo. Ĝi

kriegis senbride eĉ tiam, kiam la gvidanto pendigis silkajn ŝnuretojn sur la venkintan lancon de Raŝica, ankaŭ tiam, kiam li fine parolis pri la gloro de cetinaa heroeco.

Kaj kiam ĉio freneziĝis, invadis la ondoj de l' miloj da korpoj al Raŝica kaj haltadis subite antaŭ li, kaj tiam ili pli kaj pli ondiĝis.

Kaj la ringludo finiĝis en tumulto kiel neniam: apenaŭ oni sukcesis iel viciĝi kaj forakompani la gvidanton.

Tradukis: Fran Janjić

# LA JUBILEA KONFERENCO EN HERZBERG

*Malgosia Komarnicka*

**INA**  
INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO

Ekde la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2011 en **Herzberg am Harz** - la Esperanto-urbo - okazis la jubilea INA-Konferenco. La konferenceto troviĝis en Ginsengo-butiko situanta ĉe la ĉefstrato de la urbo kie je dispono de ĉiuj partoprenintoj estis bone ekipita prelegsalono kaj novmalfermita Esperanto-kafejo. Dum siaj 25 jaroj INA (Internacia Naturkuraca Asocio) organizis 4 konferencojn kaj la ĉi-jara 4-a estis escepte feste celebrata. Pro la asocia jubileo la programo de la konferenco estis eksterkutime riĉa, plena de prezentaĵoj, ekskursoj kaj antaŭ ĉio interesaj prelegoj de fakuloj, kiuj enkadrigis en la konferenca temo: **Signifo de naturkuracado en la nuna mondo.**

Ĉeestintojn, kiuj alvenis el naŭ landoj, solene salutis la urbestro de Herzberg sinjoro Gerhard Walter en la salono de la urbodomo. En sia saluta alparolo li akcentis, ke en ĉi-tiu parto de la mondo la informiteco pri Esperanto estas relative alta, kreskas interesiĝo pri Esperanto kaj ĉiuj Esperantaj renkontiĝoj elvokas estimon kaj admiron de loĝantoj al universalaj ideoj de Zamenhof. Mi plene atestas tion, ĉar mi loĝis dum 10 monatoj en Herzberg kadre de Grundtvig-Asistanteco kaj ĉeestis gravajn Esperantajn kaj ne-Esperantajn urbajn eventojn. Nun, vizitante denove (post pli ol unu jaro) ĉi tiun belan urbeton, mi kun granda ĝojo konstatas, ke multaj homoj konstante ankoraŭ min memoras kaj eĉ preparis por mi specialan, abundan programon de la restado kaj kelkaj el ili surprizis min per bona kono de Esperanto.

La urbestro de Herzberg lernas Esperanton kaj li jam bone ĝin scias, sed dum oficialaj renkontiĝoj li tamen plej ofte uzas la germanan lingvon, kaj Harald Schicke, la prezidanto de INA, interpretis Esperante liajn salutparoladon kaj respondojn al la demandoj de la ĉestintoj.

La urbestron dum la konferenco akompanis ankaŭ ĵurnalisto de loka gazeto, kiu baldaŭ aperigis lian raporton ilustritan per komuna foto de ĉiuj partoprenintoj.

INA, la Internacia Naturkuraca Asocio estas faka organizaĵo en Esperantio, kiu estis fondita en la jaro 1986 kaj ĝia ĉefa principo estas: obei al la leĝo

de la naturo kaj helpi al la natura forto en la homa korpo kiu estas ŝlosilo por kuraci malsanojn. La INA-konferencon partoprenas ne nur fakuloj, simpatuloj, sed ankaŭ simplaj interesiĝantoj pri alternativa kaj naturkuraca medicinoj.

Kadre de la ĉi-jara konferenco okazis tritaga profesia kaj praktika Simpozio por germano-parolantaj kuracistoj pri la temo: korea kompleksa medicino kaj sa-am akupunkturo. Ĝi kunvenigis 20 fakulojn: medicinistojn kaj naturkuracistojn el kvin landoj. La Seminarion Esperante gvidis d-ro Puramo Chong el Koreio kaj germanen tradukis Harald Schicke. La Seminario estis plene sukcesa kaj ĝiaj partoprenintoj la lastan tagon jam multe komprenis Esperanton kaj eĉ interesiĝis pri ĝi. Esperanto ĉi-okaze kiel lingvo, estis paca ponto, kiu faciligis komunikadon inter homoj de diversaj landoj uzantaj malfacilajn fakajn terminojn.



La ideo de doktoro Puramo Chong kaj Harald Schicke estas proponi similajn Seminariojn en Esperanto por ne-Esperanta publiko kaj eĉ fondi en Herzberg Centron pri Orienta Medicino.

Mi unuafoje ĉeestis la INA-konferencon kaj certe jam estos konstanta ĝia partoprenanto. La konferenco estis perfekte organizita kaj sufiĉis tempo por ĉeesti seriozajn, valorajn prelegojn, sed ankaŭ distrajn programerojn, foje ĉe glaso da biero aŭ mielvino laŭ la principo, ke bonaj emocioj plifortigas kaj protektas nian organismon kontraŭ malsanoj ...

► La partoprenintoj de la INA-konferenco havis la eblecon viziti Herzberg, la urbon, kiu situas meze de Germanio, en Malsupra Saksio (Niedersachsen), ĉe la suda flanko de la Harz-montaro kaj kiu ekde julio 2006 uzas la oficialan kromnomon "la Esperanto-urbo". Ili ankaŭ vizitis ĉirkaŭajn vilaĝojn kaj urbojn, admirante belajn pejzaĝojn, aŭdante interesajn surlokajn historiojn aŭ renkontigante kun bonkoraj homoj.

La INA-konferenco montris kiel grava estas komuna agado de esperantistoj ankaŭ en ne-Esperanta medio, partopreno en socia vivo de la loĝantoj kaj komuna laboro je diversaj niveloj kaj

kampoj. La organizantoj ricevis moralan subtenon por sia agado ne nur de lokaj gravuloj, sed antaŭ ĉio de loka socio, kiu ĉiam amike rigardas E-medion.

Dum la tuta semajno oni sentis la zorgeman spiriton de Zamenhof, ĉar malofte dum E-aranĝoj renkontiĝas nur samaj bonkoraj homoj, kiuj radias nur saman pozitivan energion, kiel estis dum la ĉi-jara INA-konferenco en Herzberg.

Ne nur ĉi-tiu urbeto, la neforgeseblaj konferencaj travivaĵoj, sed antaŭ ĉio la amikeco, kiun mi trovis kaj spertis je ĉiu paŝo dum mia restado, por ĉiam restos en mia koro.

## IKEF-kunveno dum la 96a UK en Kopenhago

✍ **Roland Rotsaert**

Mardon, la 26-an de julio 2011, enkadre de la 96-a UK en Kopenhago, okazis kunveno por IKEF-membroj kaj -interesitoj. Ĉeestis ĉ. 30 personoj; gvidis la kunvenon Roland Rotsaert, kasisto de la asocio. Komence li transdonis salutojn de s-roj Braun, kunfondinto kaj eks-prezidanto de IKEF, kaj Wang, estrarano, kiuj ne povis ĉeesti.

Sekvis raporto pri la (malvigla) agado de IKEF, kiu jam estis priskribita en la numero 100 de *La Merkato*. Tamen, estas stabila financa bazo kaj eĉ sen grandaj enspezoj IKEF povos dum pluraj jaroj plufunkcii kiel dum la pasintaj jaroj. Estas espero ke dum la venontjara UK prezentos sin nova prezidanto kiu donos novan elanon al la asocio.

Post la administra parto sekvis tri prezentadoj: s-ino Kamelia Gao (KN 862) prezentis ĉinajn brodaĵojn, s-ro Alfred Schubert (KN 864), peranto de komercaj kontaktoj, anoncis la prelegon pri 'Klubo Elito' de vendredo, la 29-an de julio, kaj s-ro Brunetto Casini (KN 1415) prezentis la projekton 'KOS-MO' (komisiono por serĉado de mono). En fina parto membroj rakontis pri propraj spertoj en Esperanta komerco. S-ro Josep Franquesa Solé (KN 133, Hispanio-Katalunio) jam en 1960, post la UK en Bruselo, unuafoje komercis per Esperanto. Li trovis partneron pere de la Japana Esperanto-Asocio. Li importas varojn el Ĉinio ekde la pekina UK, dum kiu li ligis kontaktojn kun s-ro Wang. Por ambaŭ la stimulo por komerci per Esperanto estas la fakto ke ili ne parolas la anglan kaj ke nur Esperanto estas komuna lingvo. S-ro Miguel Faria de Bastos (KN 1104, portugala juristo kiu dum plej granda parto de la jaro rezidas en Angolo) iam okupiĝis pri propono de eksporto de ercoj al Ĉinio, kiu finfine estis senrezulta. En Angolo aktivas multaj grandegaj ĉinaj kompanioj. Unuflanke ili ekspluatatas kaj eksportas mineralojn kaj petrolon, aliflanke ili aktivas en konstruado. Tiu lasta aktiveco ofte liveras nekontentigajn rezultojn, ĉar firmaoj ne

sufiĉe bone konas la lokan situacion. Cetere, ankaŭ sudafrikaj firmaoj kiuj aktivas en Angolo spertas la saman problemon. Malgrandaj ĉinaj kompanioj ne estas reprezentataj en Angolo. Angolanoj ne havas kapitalon por komenci eksterlandan komeron. S-ro Alfred Kobina Arthur (KN 1275, Ganao, ĉefe komercanta kun Barato) komercas Esperante kun Koreio. Li konstatis tute alian pensmanieron ĉe la partneroj. Nun li regule importas elektronikajn kaj eksportas lignajn artaĵojn. Li bedaŭras ke la IKEF-anoj apenaŭ konas unu la alian. S-ro Cwik (KN 1288, Belgio, pensiita oficisto de la Eŭropa Komisiono) al tiu lasta rimarko aldonis ke la nuna membroadministrado malmulte utilas. Unuflanke ĝi estas nesufiĉe uzata de la membroj, aliflanke ĝi estas tro fermita kaj la informoj kiuj enestas ne videblas por eksteruloj.

Ne estis solvo por la problemoj de IKEF, sed tamen la kunveno havigis novajn diskut-temojn.

## Nova estraro de TEĴA

Trideko da membroj kolektiĝis en la kunveno de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio) en Kopenhago lunde, la 25-an de julio 2011. La kunveno akceptis la raporton de la prezidanto Audrys Antanaitis, kaj la finanĉan raporton, kiun same prezentis la prezidanto, ĉar la ĝenerala sekretario Vytautas Šilas pro malsano ne povis ĉeesti la kunvenon.

La estraron pro propra deziro forlasis Mariana Evlogieva, Aleksandr Korĵenkov, Kalle Kniivilä kaj Gabriela Kosiarska. Por nova mandatperiodo estis elektitaj la prezidanto Audrys Antanaitis, la ĝenerala sekretario Vytautas Šilas, kaj estrarano Dieter Rooke, kiu ne ĉeestis, sed ankaŭ ne anoncis deziron forlasi la estraron. Kiel novaj estraranoj estis elektitaj Stano Marček, Bengt Nordlöf, Alfred Schubert kaj Dmitriĵ Ševĉenko.

Poste Peter Baláz rakontis pri la novaĵreteja projekto **aktuale.info** kaj Paul Gubbins pri la revuo **Monato**. Ambaŭ esperis starigi aktivan kunlaboron kun la membroj de TEĴA. Similan esperon poste esprimis ankaŭ la nova estrarano Stano Marček, redaktoro de la revuo *Esperanto*.



# TRI NOTICOJ PRI “LA KAPREOLIDO PIRGO”

## Valora travivaĵo dum prezentado de "Pirgo"

 Zdravko Seleš

Prezentado de la romano "La kapreolido Pirgo", okaze de la ĉi-jara kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar, estis por mi iasenca aventuro. Mi jam kelkfoje renkontiĝis kun literaturaĵoj el mia infanaĝo, kaj ĉiu el tiuj renkontiĝoj estis interesa; ofte mi rememoris kion mi sentis kaj opiniis leginte tiujn librojn, kaj, malgraŭ la fakto ke post jardekoj da vivospertoj, pro kiuj en tiuj verkoj mi vidis ankaŭ ion alian, plej ofte mia unua opinio estis la plej grava kaj la sento ke mi renkontas ankaŭ min mem en tiuj libroj, estis por mi nekredible grava. Ĉar, ja, temis pri la verkoj kiuj estis profunde enĉizitaj en mian animon. La samon mi sentis kiam temis pri "Pirgo" kaj, krome, rilate ĝin disvolviĝis historieto pri la unua libro kiun mi mem elektis kaj aĉetis estinte unuaklasano de elementa lernejo. Kaj mi trovis en mia biblioteko la respektivan libron, eldonitan en la jaro 1970.

Sed, preparante min por la prezentado, min trafis la fakto, ke tiu kortuŝa porinfana romano jam dudekon da jaroj ne estas legendaĵo de kroataj infanoj pro sia partizana fono, kiun mi, estiinta infano, preskaŭ ne rimarkis. Tial estis tre interese ekscii, ke preskaŭ du trionoj de la ĉeestintaj kongresanoj tralegis kaj konis la libron; kaj ne nur kroatoj, sed ankaŭ aliaj eksjugoslavaj esperantistoj. Evidente do temas pri la verko kiun tamen forte stampis iu pasinta epoko.

Tial la noto pri "La kapreolido Pirgo", kiun verkis mia lernantino Mihaela, naskiĝinta en la epoko kiam oni ne legas la romanon devige, estas samtempe iasenca eksperimento, kvankam ŝi nun estas dek jaroj pli aĝa ol mi kiam mi estis leginta pri Pirgo. Tralegu ŝian noton kaj vi vidos, ke la kortuŝeco de rakonto superas ĉiujn tempojn kaj ideologiojn kaj parolas la samon al bona leganto, negrave ĉu li aĝas sep, deksep aŭ sepdeksep jarojn. Tial la subskriboj de Anđelka Martić, la aŭtorino, en du libroj en mia biblioteko, tiu eldonita en 1970 kaj en la eldono de la Esperanta traduko de Josipa Katunar, kaj la renkontiĝo kun ŝi, estas por mi trezoro kaj valora travivaĵo.

## Neforgesebla Pirgo

*Pri la romano "La kapreolido Pirgo"*  
de Anđelka Martić

 Mihaela Cik

Antaŭ ol mi komencis legi la romanon "La kapreolido Pirgo" de Anđelka Martić, mi demandis miajn gepatrojn ĉu ili povas rememori ion pri la libro. Resume, mi sciigis ke "Pirgo" estas porinfana romaneto kiu rakontas pri la vera rilato inter knabo kaj lia kapreolido dum la Dua mondmilito. "Pirgo" restis en bona memoro de multaj homoj kiuj legis ĝin kaj al ni restis ĝia mesaĝo.

La kvinjara knabo Željko kreskis fore de sia hejmo, en la arbaro, kun sia patro kaj aliaj kamaradoj. La milito, sinonimo por timo kaj sufero, ŝanĝis ĉion kaj ĉiujn, sed poste Željko parolis pri tiu periodo kun rideto. Pri tio estas merita tre speciala kapreolido - Pirgo. Ĉio komenciĝis dum la atako al arbaro, kiam Željko kaj Pirgo, ambaŭ perdiĝintaj kaj timigitaj, trovis konsolon unu ĉe la alia. Unu el la kamaradoj bone diris: "Ido alpremism sin al alia ido serĉante helpon". Ekde tiam ili kune plibeligis ĉiutagaĵon de ĉiuj ĉirkaŭ si. Tre kotuŝa estas la epizodo kiam Željko kaj Pirgo vizitis vunditojn en la hospitalo. Interesaj kaj komikaj rakontoj de Željko kaj petolaĵoj de bravulo Pirgo tre plaĉis al vunditoj kaj ili eĉ diris, ke ili pli rapide resaniĝos pro la ridado. Ankaŭ aliaj homoj - Onjo, Dragan, Jovo, la kapitano ... ŝatis tiun knabon, kiu volis ĉeesti ĉie kiel "vera partizano", kaj lian kapreolidon ĝuste pro la ĝojoj kaj espero kiujn ili ĉien alportis.

Tra roluloj de Pirgo kaj Željko la verkistino Anđelka Martić montras al ni la gravecon de porinfana literaturo. Mi kredas ke ŝia rakonto pri vera amikeco kaj unueco donas bonan ekzemplon al infanoj kaj ankaŭ al plenkreskuloj. Kaj tio estas la plej grava ĉar ideologioj ŝanĝiĝas tra epokoj, sed restas la ideo de homa interkompreno.

## "Pirgo" tradukita en la ĉinan

Nur du monatojn post la apero de "La kapreolido Pirgo" en Esperanto, ni eksciiis, ke pere de la Esperanta eldono ĝi estas tradukita en la ĉinan lingvon. La tradukon faris Shi Chengtai, kiu en sia letero skribis: "Dum ĉinizado de la romano mi kelkfoje preskaŭ larmis pro la kortuŝado. La aŭtorino ja estas virtuoza pri la infanliteraturo, ŝi ne rekte priskribis pri batala sceno aŭ milita teruro, tamen ŝi rakontis al legantoj pri la amo inter homoj kaj besteto, inter la kamaradoj dum la milita periodo ... tia verko ja devas esti klasika kun la eterna beletra voloro ...".

# MIRINDA INTERNACIA RENKONTIĜO

✍ Divo Pulitika

📷 Mihovil Gotal (fotoj 1-4)  
kaj Sophie Berlin (foto 5)





Kiel ĉiu rakonto, ankaŭ tiu ĉi komenciĝas per "Iam en fora tempo, tempo ege fora ..." aŭ pli precize, 11 monatojn fora – dum la jarkunveno de Kroatio Esperanto-Junulara Asocio (KEJA). La eksa estraro parolis pri la laboro de KEJA dum la lastaj jaroj. Dum la rakotado pri landaj kaj eksterlandaj renkontiĝoj, du pasintaj MIROj estis menciitaj. Du ege sukcesaj MIROj, kun pliaj dekoj da partoprenintoj (eĉ ĉirkaŭ 80). Mi miris la sukceson de organizintoj.

"Ĉu vi organizos ĝin denove?" – iu demandis. "Ne, ĉi-jare ni havos tro multe da alia laboro. Sed ni helpos se iu alia volus esti la ĉeforganizanto" – diris la eksa estraro.

Ne, tio ne eblas! Mi volis finfine partopreni tiun MIROn pri kiu ĉiuj parolas. Eble pro la kuraĝiĝo kaj/aŭ freneziĝo ĉar mi iĝis la nova prezidanto, post la kunveno mi demandis: "Ĉu NI organizu ĝin?"

Kaj la ideo pri nova MIRO naskiĝis!

Komence ŝajnis ke organizi la renkontiĝon ne estos granda problemo. Post la sukcesa REF unu jaron antaŭe, kaj pro la kontento de REFanoj, ni decidis uzi la saman lokon. Tiam ni ne sciis multe, kaj eĉ ne povis imagi la belecon de *Stara Sušica*, la mezepoka kastelo en la "verda koro" de Kroatio – *Gorski Kotar*. La programon ankaŭ ne devus esti tro malfacile prepari. La beleco de la naturo preskaŭ mem jam ofertis ĉion. Do, la venonta paŝo estis elekti datojn kaj inviti homojn.

Komenco de aŭgusto ŝajnis esti perfekta. Ĝi estis tuj post la IJK kaj UK kaj tuj antaŭ FESTO. SAT-kongreso kaj SES okazas samtempe, sed ni pensis ke ili ne interesos la samajn homojn kiel MIRO. Jen nia unua eraro.

"Ĉiuj junuloj uzas la interreton kaj estos sufiĉe varbi por MIRO tie" – estis mia sufiĉe stulta ideo, aŭ la dua eraro.

Tempo pasis kaj la 1-a de aŭgusto alproksimiĝis. Post la komenca granda intereso pri MIRO inter junuloj en kaj ekster Kroatio, la nombro de interesiĝantoj malgrandiĝis ĉiutage. Paralele al tio, ni iĝis pli kaj pli nervozaj.

"Ĉu vere la nia estos la unua sensukcesa MIRO, ne nur inter la MIROj sed inter ĉiuj Esperantaj renkontiĝoj kiuj okazos ĉi somere?" – tio estis la malagrabla penso en niaj kapoj.

Ĉi tio estis la unua projekto de la nova estraro de KEJA kaj, mi devas agnoski, ni ne sciis kion fari pri la streso. La nombro de aliĝintoj malgrandiĝis al 14. Nian senesperon iom kalmiĝis la kuraĝigaj vortoj el KEL, Liberiga Stelo kaj Esperanto Societo Rijeka, ĉiuj pretaj helpi, pro kio ni estas ege dankemaj!

Venis la nokto antaŭ MIRO. Lastmomente eĉ pliaj homoj nuligis sian aliĝon. Rijekanoj diris ke ili venos, sed ne antaŭ jaŭdo. Do partoprenos nur 8 gejunuloj dum la unuaj 3 tagoj ... kion diri en la kastelo, al homoj kiuj kutime laboras kun almenaŭ 15 personoj? Ĉu nia MIRO estos fiasko?

La renkontiĝo komenciĝis, kaj ĉu mi eĉ povis imagi ke post ĉiuj problemoj ĝi estos tiom bela? Tute ne! Ni estis bonvenigitaj de tre agrablaj kuiristinoj kaj la estrino de la kastelo. Ili certigis nin ke ne estos ia problemo eĉ se ni estos malmultaj. La bona flanko de tio estis ke ĉiu povis havi propran ĉambron! Preskaŭ 6 litoj po persono, sufiĉe vaste por farti kiel princo en sia kastelo.

Mi ne scias ĉu ekzistas iu kiu ne aŭdis pri la belecoj de Gorski Kotar, sed oni plej bone spertas ilin ekskursante.

La unua ekskurso devis esti al la kanjono *Kamačnik*. Bela ideo, sed ĉu ni sukcesos piediri 15km? Certe! Ni ekiris matene, promenante tra belegaj lokoj inter Stara Sušica kaj Vrbovsko. Sufiĉe longa promenado por havi tempon por paroli kaj pli bone konatiĝi kun ĉiuj.

La venontan tagon ni daŭrigis kun la sama energio. Ni grimpis al *Javorova kosa*, pinto de la apuda monteto. Ni estis bonŝancaj ĉar ni venis ĝustatempe por trovi arbarajn fruktojn. Dum tiuj tagoj en *Ravna Gora* okazis *Plodovi gorja* (Fruktoj de montaro), festo kie oni konatigas la gastojn kun ĉio kion la naturo ofertas en la ĉirkaŭaĵo. Virino el la loka klubo estis nia gvidantino. Ŝi montris al ni la naturajn, sed ankaŭ homajn kreaĵojn: frambojn, rubusberojn, fragojn, hejmfaritajn likvorojn kaj kukojn el fruktoj. Survoje ni vidis (kaj uzis) la akvon el kuraciga fonto *Božji studenac*. Starante sur la pinto de tiu monteto oni povas vidi la tutan lokon *Ravna Gora*. Interese, oni imagas vilaĝon, sed ĝi estas ja sufiĉe granda, preskaŭ urbeto.

Fine venis jaŭdo. La Rijekanoj alvenis kaj jen, ni estis 21. Kia belega surprizo! Nun ni havis pli da aŭtoj kaj decidis fari alian ekskurson matene, antaŭ la posttagmeza programo. Ni decidis iri al *Vražji prolaz* kaj *Zeleni vir*. Mi iom timis iri tien ĉar ni jam estis en kanjono, sed *Vražji prolaz* estis multe pli profunda kaj estis peko veni al *Gorski Kotar* kaj ne vidi ĝin. Belega rivero fluis sube dum ni promenis sur la pontoj, ĉirkaŭ ni etendiĝis altaj ŝtonaj muroj laŭ kiuj akvo milde fluis, antaŭ ni estis belega verda arbaro kaj super ni pura blua ĉielo. Ni finis la ekskurson ĉe *Zeleni vir*, granda akvofalo apud kiu oni povas senti etajn gutojn de akvo kiuj malvarmigas kaj mallacigas lacajn ekskursantojn. Guste kion oni bezonas je la fino.

Posttagmeze venis *Goranske vunarice*, virinoj kiuj instruis al ni kiel uzi lanon. Komence ŝajnis ke tiu programo povus esti tro porinfana, sed ĝi estis interese! Ĉiu el ni kreis ion per propraj manoj, uzante tipan metodon el tiu regiono. Belega memorajo kiun ĉiu povis porti hejmen.

Iom post iom venis la lasta ekskursita tago. Ni decidis uzi la bonan veteron por iri al la maro. Lastmomente ni ŝanĝis la planon kaj ne iris al la plaĝo *Voz* sed al *Silo*, kie ni uzis la ripozejon de la amikaro al kiu apertenas iuj el la rijekaj partoprenintoj. Ili vere kreis ion interesan. Ĉio troviĝas en iom izola herbejo apud la maro kien ili alportis du ruldomojn. Meze estas kelkaj sofoj kaj tabulo. Eĉ necesejo kaj duŝo estas tie, kaj antaŭ ĉio kreskas figarbo. Perfekta loko por ĉiuj kiuj volas ĝui la maron kaj la naturon sen homamaso ĉirkaŭe. Unu plia tago en la belega MIROa semajno.

La lastan nokton venis loka ĉasisto kiu antaŭe laboris en la kastelo. Ludante sian akordionon li dancigis kaj kantigis nin, kreinte etoson kiu ne finiĝis longe post lia foriro. Surprize venis ankaŭ kuko, donaco de la kuiristinoj.

Krom ekskursante, cetera ni estis ankaŭ en la kastelo. Estis hejma etoso dum la tuta renkontiĝo. La manĝaĵoj estis bonegaj, precipe tiuj vegetaranaj. Ĝis la fino mi bedaŭris ke mi ne skribis "vegetarano" sur mia aliĝilo. Ĉio en la kastelo estis je nia dispono: la

ejoj, ludiloj, pilkoj, tabloteniso, kuiristinoj kiuj volonte plenumis ĉiun nian deziron ... kaj ni uzis ĉion. Eĉ hundo estis bonvenigita. La fina sumo de MIRO estas la jena: 18 kroatoj, po unu germanino, franco kaj kataluno kun la hundo. Certe ne tiom da eksterlandanoj kiom ni planis, sed tamen sufiĉe por ke ĝi ne estu krokodila renkontiĝo. Bonsance la eksterlandanoj estis instruemaj kaj babilemaj kio ebligis la praktikadon de la lingvo por la kroataj komencantoj. La grava afero estas ke ni ĉiuj ĝuis la renkontiĝon. Pro la malgranda nombro de homoj

ni povis ŝanĝi la programon kiel ajn ni volis por ke restu nur la aferoj kiuj interesos ĉiujn.

Sabato estis la forira tago. Mi ne sciis ĉu mi estu trista ĉar MIRO finiĝis aŭ ĝoja ĉar ĝi estis sukcesa. Mi konkludis ke miaj timoj estis troigitaj per la manko de sperto. Eĉ la estrino de la kastelo invitis nin veni denove se ni iam organizos iun alian Esperantan renkontiĝon en Kroatio. Kaj jen la finaj vortoj pri MIRO 2011. Mi esperas ke ni sukcese refaros ĝin iam denove.



## Esperanto Aŭstralio

100 JAROJ  
1911 - 2011

*Bob Felby kaj Nicole Else*

La longe atendata jubilea aŭstralia kongreso okazis de la 9a ĝis la 17a de julio en Adelajdo. JoMo - la multtalenta homo - distris, jam la 8an de julio, per koncerto en "Folk Centre". Fakte li distris per siaj multaj kantoj ĉiun tagon kaj eĉ plurajn fojojn.

Esperantistoj vestitaj laŭ la modo de 1911 alvenis trajne el Melbourne. La interkona vespero okazis en kafejo "Vagabondo" en Nordadelajdo.

Ekumena renkontiĝo, kiun bonege gvidis Libby Mortimer kune kun Pat Palmer, okazis la 10an. Poste sekvis la jarkunveno de Aŭstralia Esperanto-Asocio, kiu daŭris kvar horojn, sed interrompita de unuhora ekskurso al Botanika ĝardeno.

Profesoro Humphrey Tonkin, elstara intelektulo, parolis kvar fojojn. Estis granda plezuro aŭskulti lian belegan Esperanton. Nun ni ĉiuj klopodas paroli same bone kiel li!

La komuna fotografado okazis en precize la sama loko, kie antaŭ cent jaroj okazis la unua komuna fotografado de la anoj de AEA.

Okazis kunveno de ILEI kaj kunveno pri la bahaa religio kaj Esperanto. Penny Vos parolis pri sia projekto "Mondeto", Gordon Coleman pri "Esperanto en sia baza lernejo", Trevor Steele prezentis Esperanto-kvizon. Okazis individuaj prezentadoj. Parolis Margaret Furness pri la pasinta UK en Adelajdo en 1997. Huigh Malcolm parolis pri "Dume, aliloke dum 1911". Okazis konversacia rondo gvidata de Dianne Lukes. Alan Bishop ekzercis kun la koruso. Sandor Horvath montris Esperanto-filmojn. La mediogardisto Helen Palmer parolis pri mediprotektado. David Ryan el Novzelando parolis pri Novzelando. Okazis longa ekskurso kun rostoffesto al nacia parko Belair. Pri Aŭstralia Esperanto-literaturo parolis Trevor Steele. Pri Nia historio parolis Terry Manly kaj Charles Stevenson. Katja Steele instruis florarangadon. Alan Bishop parolis pri matematiko. Okazis diskutgrupo pri "Cent jaroj kaj nun?". Max Wearing parolis pri "dekdu sezonoj en Esperantujo". Okazis ankaŭ kartludado, eĉ komuna kantado kun la koruso. Okazis dramokonkurso.

Dum la tuta semajno funkciis tre bona Libroservo estrata de Katja Steele. Okazis kvinfoje Esperanto-kurso por komencantoj. Tuj antaŭ nia kantovespera konkurso Ally kaj Dieter Hauptmann prezentis balalajko-koncerton, kiu estis eksterordinare ekscita kaj bonega. JoMo - la surprize bonega homo - kantis kune kun Dieter la popularan rusan kanton "Kalinka".



# INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Raporto

 Miroslav Hruška

De la 14-a ĝis la 21-a okazis la unuan fojon IJK en Ukrainio. Ankaŭ mi partoprenis. Du antaŭaj vizitoj al Ukrainio estis bona antaŭpreparo por tiu ĉi vizito. Komence la vojaĝo tra Ukrainio estis etete sovaĝa. En Ĉop enrajnigis Veronika kun Imre de Hungario, sed de Lvov ni jam veturis senprobleme. Precize, laŭ la horaro ni alvenis al ĉefa stacidomo de Kievo, kie atendis nin du organizantoj, kiuj aĉetis por ni ĵetonojn por metroo. Por atingi la IJK-ejon ni veturis unu haltejon per metroo kaj poste proksimume 45 minutojn per marŝrutko.

Jam tradicie ĉe la alveno oni ricevas ŝlosilon de loĝĉambro kaj registriĝas, sed evidentiĝis, ke la organizantoj estas tiom okupitaj, ke mi ne povos registriĝi tuj. Posttagmeze ni ĉiuj forveturis al solena malfermo, dum kiu oni povis aŭskulti koncertetojn de diversaj ukrainaj grupoj. Al mi precipe plaĉis la grupo *Thelen*, kiu kantis du kantojn, el kiuj la unuan en Esperanto.

La unua vespermanĝo estis ankaŭ interesa: la organizantoj de IJK ŝajne forgesis mendi la vespermanĝon kaj tio signifis, ke ni devis relative longe atendi ĝis kiam ni ricevis niajn manĝaĵojn.

Malgraŭ tiuj ĉi problemoj homoj volis amuziĝi kaj ion trinki kaj tio signifis, ke mi kun Martin Sawitzki devis prepari trinkejon. Kun Sveta ni veturis al loka granda vendejo, kie ni aĉetis bierojn, kvasonj ktp...

Vendrede mi havis prelegon pri Fervoja trafiko en Ĉeĥio, sabate mi kun miaj amikoj Jarda, Krzysztof kaj KuboF ekis naĝi je insulo apud rivero Dnepro, dimanĉe mi kun Jarda kaj Robert partoprenis la romkatolikan sanktan meson en urbcentro en la romkatolika preĝejo. Poste ni aliĝis al ekskurso, kiun gvidis Karol kaj Natálka. Dum tiu ĉi ekskurso ni vizitias muzeon de Ivan Gonĉar kaj vidis ankaŭ la statuon de Patrio-patrino. Mi ankaŭ

kun Jarda persone testis funikularon en urbcentro. Lunde estis kultur-lingva festivalo, dum kiu mi prelegis pri Ĉeĥio kaj mi poste estis intervjuita de Dan Mrázek.

Ĵaŭde mi kun multaj partoprenantoj de la sporta tago vizitis parkon en Feofanio, kiu estis vere ĉarma kaj bela.

Dume mi redaktadis artikolon pri IJK 2011 en Esperanta Vikipedio, skribis pepaĵojn en Twitter kun haket-etikedo #IJK2011 kaj kun ĝojo vidis, kiel mia amiko Jarda, por kiu tiu ĉi aranĝo estis la unua granda Esperanto-aranĝo, ĝuas ĉion kaj ekhavas novajn geamikojn. Kune ni merkrede vizitis Ĉehan centron en Kievo, kie ni estis akceptitaj de lokaj laborantinoj kaj ni konatiĝis kun juna studentino, kiu de septembro studos ekonomion en Brno. Post la reveno de la Ĉeĥa centro mi ankoraŭ havis prelegon pri E@I kaj poste gvidis seminarion pri Vikipedio.

Ĵaŭde - fino de la kongreso. Malmulte da dormo (kiel kutime homoj ĝis malfruaj noktaj horoj vizitadis trinkejon), multe da brakumoj kaj kisetoj dum la adiaŭado kaj posttagmeze ek al Krimeo!

Do, la programo estis vere agrabla. Tio estas sen diskuto. Al organizantoj apartenas miaj dankoj. Sed tamen, ĉu nur dankoj? Mankis filmejo, povis esti pli grandaj porcioj de manĝaĵoj en la restoracio, oni povis nin averti, ke ni uzos turkstilajn necesejojn kaj eble ne devis loĝi en la bazejo iuj homoj, kiuj ne partoprenis la arangon kaj mi sentus min pli sekure en la IJK-ejo...

Sed malgraŭ la problemoj inter la organizantoj, kiuj estis videblaj (mi kutime ne registriĝas kaj pagas la kotizojn du aŭ tri tagoj post komenco), mi absolute ĝuis la arangon kaj la urbon.


Kaj renkontiĝi denove kun geamikoj de la tuta mondo, tio estas nepagebla. En mia memoro restos multe da travivaĵoj.



*Komuna foto de la IJK-partoprenintoj en Kievo kaj la kongresa emblemo.*

# VIVI ESTAS DANĜERE

 Antónia Kis



En la selo inter la montaroj super la urbo Split levigas la rokfortikaĵo Klis (Klissza) ĉirkaŭata nure de ŝtonoj. Nun jam proksimiĝante al la fino de sia vojo ili povus ekspiri senangore, ja baldaŭ ili malleviĝos al la marnivelo. Kaj tiam estos finitaj tiu premiteco inter ŝtonoj, tiuj vivdangeraĵoj, tiuj spirhaltigaj ravinoj. La viro eĉ iom lozis sian pozon streĉitan pro la atentego, kaj li jetis rigardon al la edzino.

Sed ŝi anstataŭ trankviliĝi, sereniĝi, rideti, rigardis moroze antaŭ sin, el ŝiaj okuloj faladis dikaj larmoj.

– Kio estas la problemoj? – demandis la surprizita edzo. – Ni alvenos baldaŭ. Ni veturis tute bone. Kvankam ni havis ankaŭ pluvon, eĉ ne unufoje. – Li rigardis la horloĝon sur la instrumentpanelo. – Tion mi ne kredas, ke tio sukcesos dum tiom da tempo. Rekordtempe, nu jes, jes! El la okulangulo li kaŝrigardis la edzinon atendante la laŭdon.

Sed ŝi diris nenion, ŝi trinkigis la musojn plu<sup>1)</sup>.

– Ĉu vi sentas vin malbone? – demandis la edzo ektimante.

– Ne, ne, trankviliĝu, sed eĉ por pripensi estas terue, la teruraĵoj, la hororaĵoj, ho ve, kiom ili suferis ...

– Pri kio vi parolas? Tiel mi ne povas stiri ... Ĉu mi haltu ie?

Post granda suspiro fine ekparolis la edzino. – Nu, reĝo Adalberto la kvara kaj lia familio. Vi scias, ni legis kune, ili fuĝis ĉi tien de antaŭ la tataroj. La tuta familio, la plena, reĝa domanaro. La viroj ĉevalrajde, la virinoj, la infanoj, la bagaĝoj surĉare. La vojo verŝajne daŭris longe, ne kiel por

ni. Ili luktis sur senvojaj vojoj. Senmanĝe-sentrinke. Ploris la infanoj.

– Tamen mi ne kredas, ke senmaĝe kaj sentrinke. Laŭ mi ili faris belegajn pakajojn. Vinon ili kunportis tutcerte. Kaj krome la montoj estas plenaj je fontoj.

– Ŝi ne lasis sin konsoli. – Sed pro la fuĝado, pro la terura danĝero ili malsaniĝis, du iliaj filinetoj eĉ mortis. La etan junaskiton Margit ĝuste tial oferis Adalberto al la bona dio, por ke li ne tuj forprenu ankaŭ ŝin.

– Trankviliĝu, mi petegas vin, pri tio ni jam ne povas helpi. – La viro nun komencis vere maltrankviliĝi pro la edzino. Ŝi estis ja ĉiam sensema, timema kreitaĵo, al li tiutempe, kiam ili interkonatiĝis, ĝuste tio ekplaĉis en ŝi. Sed post la paso de la jaroj tiu timo estas pli kaj pli forta. Ekzemple ankaŭ nun ili povus kunporti la kvinjaran nepon Balázs, se la edzino entreprenus tion, se ŝi ne timus tiel multe.

– Tiu infano estas tiel scivolema, li volas provi ĉion, kredu min, eĉ ni duope ne povus lin bridi. Knabo – ŝi aldonis emfaze, ĉar ŝi opiniis, ke estis multe pli facile siatempe kun sia obeema filineto.

Do, lia edzino estas tia timema kunikleto. Al li plaĉis siatempe, ke ŝi serĉis rifuĝon ĉe li, ĉar ŝi pensis lin tiel forta. Nur tre malrapide ŝi alkitimiĝis al la marborda medio mirante la fremdulojn, la marakvon, ĉion nekutiman.

Oni devis ŝin multe instigi, ĝis fine ŝi kuraĝis eniri la maron. Kvankam ili elektis por bani tute sekuran, sablan parton tenitan en ordo, baritan per ŝarkoreto.

Ŝi promenadis sola ne ofte, ŝi estis tro

singardema por tio, ŝi nur sidis kaj ĉirkaŭrigardadis. Eĉ se ŝi ne diris, li sciis, ke ŝi ordigadas en si la pensojn kiel estus, se ankaŭ la nepo ĉeestus.

Iun tagon aperis sur la plaĝo unugamba, kripla viro. La loko estis supozeble konata por li, ĉar li gaje paŝadis per siaj du kubutlambastonoj. Atinginte la ekstremon de la moleo li deprenis tiun unusolan ŝuon, kaj zorgeme li metis ĝin en kumulon kune kun siaj vestaĵoj. Eninte la akvon li jam ridis pro la ĝojo. Surdorse kuŝante li ŝvebis sur la akvo, per levita mano li mansignadis al la pli timemaj banemuloj.

Sian atenton pri la kuraĝulo alvokis la edzo ĝuste tiam, kiam ŝiaj pensoj estis okupataj per alia kuraĝulo, per la nepo. Ŝi citis la lastan komunan travivaĵon, kiam ŝi iris al la infanĝardeno por la nepo, por ke la filino, fininte la laboron, de ili lin portu hejmen. La nepo kalkulis pri la dorlotado, li petis, ke "dolĉa ŝtiparo"<sup>1)</sup>, ŝatata manĝaĉo de Balázs estu metita iomefe en la mikroforon. Okazis tiel, kaj ĉar la samtempa ŝarĝo estis tro granda, ili restis sen elektro. Haltis la lavmaŝino, silentiĝis la tovo, la radio, mallumiĝis.

– Kiam venos hejmen avoĉjo? – interesiĝis la infano. – La elektrofariŝto ĉe ni estas avoĉjo.

– Diru nur, kara Balázs, ĉu ankaŭ vi aŭdis: *klak?*

La etulo kapjesis, kaj li montris en la direkto al la antaŭĉambro. De tie aŭdiĝis la klako.

– Povis esti nur la cirkvitgardilo, ne estas mirinde, estis tro por la povra, sed ĝin ankaŭ ni povos ripari, se vi estas sufiĉe kuraĝa – diris la aŭdaca avinjo. Ŝi prenis la brosbalaŭlon el la ŝranko de puriĝiloj, kaj ŝi levadis ĝin kontraŭ iu malsuprendirekta ŝaltilo sur plasta tabulo.

– Ĉu ankaŭ mi povas ĝin teni? – demandis la infano, kaj li jam forte kaptis la tenilon de la brosbalaŭlo.

Ekparolis la radio, eklumis la lampo.

– Vi estas lerta, kuraĝa knabo – laŭdis lin la avino.

– Jes, mi estas vere kuraĝa. Ni tri estas kuraĝaj en la infanĝardeno. Mi, Attila kaj Krisztián. Joĉjo ne. Joĉjo estas malkuraĝa.

– Kiu diris tion, ĉu la infanĝardenistino?

– Ne, sed Attila.

Ŝi ekridetis. Estis bone revidi tiun ĉi scenon. Ŝi decidis, nun ŝi eniros la akvon por mergiĝi iomete. Ŝi ekpaŝadis enen. Apude viro kondukis sian filinon man-en-mane. La knabino malrapide sovis la piedojn antaŭen sur la fajna grundo. Ŝi ŝajnis esti feliĉa, sed ŝia rideto estis iom stranga. Tiam ŝi rimarkis, ke la infano estas blinda. La knabino subite haltis, ŝi delasis la patran manon, kaj ŝi iris plu sola kun majeste inspirita vizaĝo. La patro paŝadis antaŭ ŝi, sed turniĝante al ŝi. Li ĝojis pro la feliĉo de sia filino.

Post semajno irante hejmen, la viro demandis la edzinon, ĉu iri preter Klis, ĉar tiudirekte estas iom pli mallonge kaj pli facile, ĉar la vojo

estas jam konata. Ŝi kapjesis, sed kiam ili denove kurbumadis inter la rokoj, tiam rompiĝis la meĉo<sup>3)</sup>. Ŝi glutis la larmojn, senvoĉe, por ke la edzo ne rimarku. Sed li tamen rimarkis: – Nu jen, – li diris –, ĉu denove Adalberto la kvara? Ankaŭ mi bedaŭras lin, li havis luktoplenan vivon, kaj aldone tiuj multaj konfliktoj. – Li ekridis abrupte. – Kaj aldone eĉ la tataroj pelis lin ...

– Nun vi ne okupiĝu pri tio. Vi atentu nur pri la vojo, Adalberto! La virino terurigiĝinte kroĉis sin surbruste al la sekurekrimeno. Ŝi havis kapturniĝon ĉe la kurbiĝoj. "Ho, kara mia dio, nur tion ni transvivu!" Ekdoloris ŝin la kapo. Ŝin turmentis mortotimo. Vivi estas danĝere.

<sup>1)</sup> Ŝi ploris plu.

<sup>2)</sup> Vidu la recepton ĉi-sube.

<sup>3)</sup> Ŝi ekploris.

*El la hungara tradukis Imre Szabó*

## Recepto de "dolĉa ŝtiparo"

**Ingrediencoj por 8 personoj:** 6 belaj pomoj, 1 superplena kafkulero da muelita cinamo, 150 g da margarino, 8 sekaj bulkoj, 1 litro da lakto, 4 ovoj, 300 g da pulvorsukero, 1 saketo da vanila sukero, 250 g da abrikotmarmelado, margarino por ŝmiri la bakplaton, bulkeron.

**Preparo:** Ni lavu la pomojn, disduigu ilin, eltranĉu la ovarion, la pulpon ni distranĉu maldike! Per la cinamo ni superŝutu ilin, kaj ni stufu ilin sur 50 g da margarino. La bulkojn ni distranĉu je 1 centimetraj dikaj stanĝetoj, kaj ni sternu ilin en altvanda bakpleto. Ni boligu la lakton. La ovoflavon kun la restinta margarino, kun duono da pulvorsukero kaj kun la vanila sukero ni miksu ŝaŭma, la varmegan lakton ni surverŝas. Poste ni verŝu ĝin sur la bulkojn, iomete ni turnu ilin, por ke ili estu ĉie atingitaj. Ni ŝmiru per margarino bakpleton ĉ. 30x20 cm grandan, ni ŝutu dise bulkeron. Duonon de la trempitaj bulkoj ni englatigu, la pomojn ni metu egaldike sur ĝin, poste per la restaĵo de la bulkoj ni kovru ĝin. La abrikotan marmeladon en malmulte (ĉ. 1 dl) da akvo ni miksu glata, kaj per ĝiaj tri kvaronoj ni ŝmiru la bulkojn. Ni baku ĝin per meza fajro (ĉ. 180 °C; en aermiksa bakujo: 165 °C) ĉ. 30 minutojn. Dume ni ŝaŭmigu la ovoflavojn, proksimiĝante al la fino ni aldonu la restintajn sukerojn kaj marmeladon. Ni ŝmiru ĝin sur la enhavon de la bakpleto kaj reŝovu ĝin en la fornon. La temperaturon ni malaltigu je ĉ. 15 °C, la ŝtiparon ni baku ankoraŭ 15 minutojn. Ni fermas la flamon, la pordon de la bakujo ni malfermas, la ŝaŭmon dum 10 minutoj sekigas. Ankoraŭ varman ni tranĉas ĝin je kuboj.

# MENSOGO, RONĜA DROGO

✍ Petro Desmet

En la tuta mondo, en ĉiuj kulturoj (almenaŭ laŭ tio kion mi scias) popolanoj esprimas la konvinkon ke mensogo neniam restas eterne kaŝita. Mi ne scias ĉu tiu konvinko pruviĝas ĉiam de faktoj, Ĉu ĝi eble estas drogo por viktimoj de mensogoj? Plej ofte tiu konvinko esprimiĝas en tre ĝeneralaj rektaj proverboj kiaj: *La tempo ĉiam malkaŝas la veron*. Foje ankaŭ iom pli delikate: *Tempo toleras, sed vero aperas*. Fakte mi iom pli ŝtas proverbojn, kiuj rekte avertas la mensogant(in)on: *Kaŝu kiom vi povos, mensogo sin elŝovos*.

En la nederlanda, kaj verŝajne ne nur en la nederlanda, oni ofte avertas: *la vero ĉiam finfine koniĝas, se eĉ necesus ke la korakoj ĝin malkaŝu!* (*al moesten de raven het uitbrengen*). Mi ne scias kial devas esti precize korakoj, kiuj havos tiun taskon, ĉar ĝenerale korakoj ja ne estas tiaj simpatiaj birdoj, ne estas tiom ŝatataj. Eble ĉar oni sentis parencecon kun la korvoj? Ĉar pri ili ankaŭ nia proverbaro diras: *Korvo al korvo okulon ne pikas*. Precipe en la kazo kiam temas pri komuna mensogo, mensogo apogita de grupo da mensogantoj, oni povus esti tentata de tia penso. Aliflanke ĝuste en tia grupo la danĝero de reciproka okulpikado nepre ne estas absoluta fantazio aŭ neeblo!

En nia proverbaro estas ankaŭ kelkaj pli subtilaj, pli belaj, pli allogaj pensoj pri malkaŝiĝo de sekretoj, kaj estas interese kompari ilin kun similaj nacilingvaj. Fakte... ili estas tiel subtilaj ke mi bezonis sufiĉe multe da tempo por kompreni la sencon de la proverboj! Precipe la apudeco de nacilingvaj proverboj helpis min kompreni! Relative facile estas: *Eĉ el sub la tero aperas la vero*. Kompreneble, unue necesas ke oni havu bonajn okulojn, ke oni ne estas distrita leganto, ĉar almenaŭ mi estis tentata legi "vermo(n)" en la teksto! Bedaŭrinde la proverbo aperas nur en la dua parto de la proverbaro, do en la parto kies nacilingvajn ekvivalentojn ni ne rekte konas. Certe estas iu parenceco kun la francaj proverboj, kiuj certigas ke *"la vérité vient toujours au jour"* (*vero ĉiam finfine venas en taglumo*) aŭ kun sprita rilatigo al substanco *"Thuile et la vérité finissent par venir au sommet"* (*oleo kaj vero ĉiam finfine venas supren*).

Por evoluintaj cerbuloj: Problemojn mi havis (kiam mi ne ankoraŭ posedis la kuntekstojn alilingvajn) kun la esperanta proverbo: *Sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas*. Jes, ĝi apartenas ankaŭ al paragrafo kiun Zamenhof titolis "mensogo"! Por slavoj ... neniu sekreto, ĉar tre similaj esprimoj estas en iliaj lingvoj. La francoj iom komplikigas,

samtempe ĉiutagigas, popularigas kaj diras *"L'on ne peut cacher anguille en sac."* ... do, ke oni *ne kapablas kaŝi angilon en sako!* Inter miaj legantoj nepre estas iuj kiuj bezonas klarigojn, ĉar ili, kiel grandurbaj homoj, konas tiajn bestojn (ĉu vere fiŝo?) nur el enrestoraciaj renkontiĝoj! Aliflanke oni tamen ne nepre devas esti angilologo por imagi al si la situacion de la povra kaj glita besto! Ĉu vere necesas altrudi al ĝi la konotacion de mensogo? Nur ĉar ĝi similas alian beston (ne-fiŝan) kiu lernis la arton ĉe Ezopo, kaj pikis la mamornamitan bruston de ... la amatino de Cezaro, se mi bone memoras.

Mi supozas ke precipe la germanoj liveris al Zamenhof ideon pli idilian, pli ekologian kaj ĉarman, kiu puŝis lin al: *Neĝo kaŝas nur ĝis printempo*. En la germana la ideo revenas en diversaj formoj, el kiuj mi donos al vi du: *"Wenn es taut, so kommet an den Tag, was unterm Schnee verborgen lag"*. Ŝajnas al mi, laŭ la formo, tre malnova proverbo! (*Kiam degelas venas en taglumo, tio kio sub neĝo kaŝiĝis*). ... kaj iom pli forte: *"Was gut ist unter Schnee versteckt, das wird im Frühling stets entdeckt"* (*Kio estas sekure kaŝita sub la neĝo, ĉiam malkovriĝas printempe!*). Do, kiom ajn zorge vi kovras mensogojn, baldaŭ tamen ili estos malkovritaj.

Unu el la manieroj laŭ kiuj vero finfine aperas estas ke mensoganto ĉiam estas ŝarĝita de minimume du versioj de faktoj. Unue li (aŭ ŝi) ne kapablas tute forgesi, tute forigi, tute subfosi la objektivan veron, ne povas forigi ĝin de sia cerbujo. Due li (aŭ ŝi) devas tre bone memori "kion" li/ŝi rakontis, "kion" li/ŝi metis en la loko de la vero, kaj deklaris veron! Se li/ŝi ne bone memoras tiam okazas ke ĉe rerakontado kolizias diversaj variaĵoj. Plej ofte mensoganto, aŭ mensogantino, cetere rakontas diversajn versiojn, adaptitajn al cirkonstancoj kaj kunparolantoj. Dum rakontado ili plej ofte ankaŭ devas iom ŝmiri la barbojn, aŭ karesi la vangojn, de la alparolato. Nia proverbaro bone bildigas la situacion: *Mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas. Kiu volas mensogi, devas bone memori*.

Ĉiokaze mia esperanta proverbaro klopodas konsoli min, klopodas doni al mi kuraĝon kaj certigas ke eĉ la plej malgranda mensogo ne restas sen sekvoj: *Nenia peketo restas longe sekreto*. Kaj kvankam mi - certe la leganto miros - ne estas fanatika kredanto de proverboj, mi tamen ĉerpas el ili iom da komforto! Nu, kial mi do lastatempe tiom ofte okupiĝas pri proverboj se mi ne estas vera proverbofila? (= proverbama). Tion mi poste klarigos! Iom da pacienco!



## “Esperanto en Kroatio al laboremuloj kroataj!”, “Kio kolerigas la estraranojn?” (ZE 2/2011, paĝoj 36-37 kaj 45)

Mi tralegis la tutan numeron 2/2011 de “Zagreba esperantisto” kaj mi estas malĝoja pro la miskomprenoj kaj kvereleoj inter esperantistoj. Mi bedaŭras pro tio. Tio ne estas bona afero por la movado.

*Zlata Nanić (Zagrebo)*

Hieraŭ atingis min la numero 2/2011 de “Zagreba Esperantisto”. Elkoran dankon. Ĉiam kiam mi legas ĝin mi sentas ian doloron kaj honton ke ankoraŭ nialandaj esperantistoj ne estas tiom organizitaj kiel

vi, malgraŭ viaj memkritikoj. Mi bone scias kiom peniga kaj multekosta estas la revuo kiun vi eldonas volontule, sed estu tutcerta ke la kontribuo kiun ĝi donas por konatiĝo de Kroatio kaj ties esperantistoj estas des pli granda. Profitante la okazon, mi salutas amikojn Radenko, Josip, Davor pro iliaj valoraj artikoloj kaj raportoj.

*Bardhyl Selimi (Albanio)*

Mi estas ravita per “Zagreba Esperantisto”! Dankojn, kaj gratulojn akceptu!

*Adri Pasztor, Miskolc (Hungario)*

Mi ricevis “ZE” kaj dum mia trajnvojaĝo al Peterburgo kun plezuro legis ĝin.

*Mikaelo Bronštejn (Rusio)*

## LA 44-A KONFERENCIO DE ILEI

*Mirjana Žeželj*

Inter la 17-a kaj 23-a de julio 2011 okazis en Kopenhago la 44-a Konferencio de ILEI. La konferenca temo estis “Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado” traktita dum du simpoziaj tagoj.

La enhavo de la konferencaj laboroj pritraktis metodojn de la lernado de lingvoj, lingvajn kapablojn kaj lingvistikajn aspektojn, socikulturajn dimensiojn kaj bezonatajn analizojn, diskutojn kaj decidojn en la procezo de lernado je diversaj niveloj de la scio. Kune kun realigado de novaj medioj - komputila kaj televida - ankaŭ disvolvas novajn eblecojn por modernigo kaj faciligo de la lingvastudado. Novaj teknologioj donas al la uzantoj novmanierajn eblecojn por memstudi, interalie ankaŭ Esperanton. En diversaj retejoj oni povas trovi multajn eblecojn por plilarĝigi sian scian. Mem studi Esperanton, profundigi siajn sciojn kaj akiri novan sperton eblas ĉe RITE (Reta Instruista Trejnado), destinita al esperantistoj kiuj posedas minimume B lingvonivelo de Esperanto. Pliajn informojn oni povas trovi ĉe [www.edukado.net/rite](http://www.edukado.net/rite)

S-ro Stefan MacGill, la prezidanto de ILEI, esprimis sian kontenton ke ILEI nun estas la plej nombra en sia historio kaj havas 103 membroj el 66 landoj.

## SUBTENU PLUAN APERADON DE "ZAGREBA ESPERANTISTO" PER VIA ABONO!

### UNUOPA NUMERO:

20,00 kunaĵoj = 3,00 eŭroj

### DUONJARA ABONO (lastaj tri numeroj de 2011):

60,00 kunaĵoj = 9,00 eŭroj

### TUTJARA ABONO (2012):

120,00 kunaĵoj = 18,00 eŭroj

### ABONHELPA FONDUSO:

Pagante iun ajn sumon, vi helpas nepagipovajn esperantistojn ricevadi nian gazeton. Listo de homoj pagintaj sian kontribuon al *Abonhelpa fonduso*, aperados regule en “Zagreba Esperantisto”.

### ENLANDAJ PAGOJ AL KONTO:

Udruga zagrebačkih esperantista, Zagreb  
2340009-1110321529

### INTERNACIAJ PAGOJ AL KONTO:

*uzes-y* ĉe Universala Esperanto-Asocio



# 3-a ESPERANTO-BOATADO SUR LA RIVERO KUPA Srećko Radulović

Esperanto-boatado sur la rivero Kupa, iniciatita de Esperanto-societo "Sisak", fariĝis jam tradicia. Ĉi-jare la trian fojon, inter la 31-a de julio kaj 5-a de aŭgusto, kunorganizis ĝin la iniciatinta societo kaj la societoj "Viktor Mihovilić" el Karlovac kaj "Mondo paca" el Velika Gorica. Per motorboatadoj oni vojaĝis de Karlovac ĝis Sisak, trapasinte en kvin etapoj la vojon de 126 kilometroj. La boatado tradicie finiĝas la 5-an de aŭgusto je Tago de la venko kaj patrolanda danko, per kio la esperantistoj aliĝas al festado de la plej granda nacia festotago.

La societoj kiuj kunorganizis la ĉi-jaran boatadon, ne estas ligitaj nur per Esperanto, sed per najbareco de iliaj departamentoj (Departamento Karlovac, Departamento zagreba, Departamento Sisak-Moslavina), tra kiuj trafluas kaj kiujn ligas ĝuste la rivero Kupa. La rivero Kupa estas perlo inter la kroataj riveroj. Ĝi fontas sub la monto Risnjak, kaj lastatempe oni ĉiam pli komprenas ĝiajn belajn kaj ĝiajn valorojn.

La trian Esperanto-boatadon partoprenis tri boatoj kun 11 partorpenantoj, kaj en diversaj lokoj kie ili kampadis, vizitis la boatantojn 15 kroataj esperantistoj, inter aliaj ankaŭ prezidantino de KEL Judita Rey Hudeček, sekretariino Spomenka Štimec kaj du vicprezidantoj, Radenko Milošević kaj Vjekoslav Morankić.

La organizantoj ricevis specialan permeson de Havena direkcio Sisak por sekura navigado kaj organizis preskonferencon la 26-an de julio, kio rezultis per bona informiteco de la publiko pri tiu ĉi esperantista aranĝo (*rim. red.* iniciatita de Srećko Radulović).

Dum la boatado esperantistoj organizis informprelegojn pri Esperanto: la 31-an de julio en Karlovac (Sanja Damjanić), la 2-an de aŭgusto

en Pokupsko (Vjekoslav Morankić), la 4-an de aŭgusto en Letovanić (Zdravka Metz) kaj kulturajn programerojn diversloke (muzikis Neven Mrzlečki kaj Giovanni Furlan).

Ĉe la starto de la boatado, la 1-an de aŭgusto, la boatantojn salutis pluraj oficialuloj, inter aliaj la urbestro de Karlovac Damir Jelić kaj estrino de la oficejo de departamentestro Bernardica Topolnjak-Halapa. En la riveron estis ĵetita botelo kun dulingva (kroata kaj Esperanta) pamesaĝo.

La fina celo de la boatado estis atingi la urban naĝejon Zibel en Sisak, la 5-an de aŭgusto, kie la boatantojn atendis reprezentantoj de la estraro de KEL Judita Rey Hudeček, Radenko Milošević kaj Zlatko Hinšt.

Dum la tuta aranĝo jam tradicie regas familia etoso, eble ĝuste pro tio ĉar ĝi ne estas amasa. Ĝi celas homojn iomete sportemajn kaj aventuremajn, kiuj pretas vivi modeste, konkorde kun la naturo kaj bivaki surborde de la rivero, kuiri siajn tagmanĝojn kaj ĝui la belajn de la regiono. Jam pli frue montriĝis intereso pri tiu ĉi nesufice konata aranĝo de kroataj esperantistoj ankaŭ ĉe esperantistoj el eksterlando. Por fariĝi plensece internacia aranĝo, la Esperanto-boatado bezonas veran kaj efikan subtenon de kroataj esperantistoj, sed ĉefe de Kroata Esperanto-Ligo. La tuta aranĝo estas organizata per minimumaj financojn de sponsoroj kaj per aliĝkotoj de partoprenantoj. Por ne paroli pri turisma graveco de tiu ĉi aranĝo, ni elstarigu nur ĝian eventualan rolon en informado pri Esperanto, kiu per nealtruda maniero atingas la aŭtoritatojn kaj loĝantojn apud la perla rivero Kupa. Sekve, ni salutas vin ĉiujn per "Ĝis revido sekvontjare". Venu kaj kunĝuu la liberan vivon sur kaj apud la rivero Kupa!